

# EL POPOLA ĈINIO

人民中国報道

11

1970

# Vortoj de Prezidanto Maŭ

La Popoloj de la tuta mondo unuiĝu kaj venku la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn! La popoloj de la tuta mondo havu kuraĝon, aŭdacu batali, ne timu malfacilojn kaj marŝu antaŭen unuj sekvante aliajn. Do la mondo nepre apartenos al la popolo. Ĉiuj demonoj estos senescepte ekstermitaj.

# Rumana Milita Delegacio Vizitis Nian Landon



Prezidanto Maŭ varme manpremas kun Ministro Ion Ionice.



Foto farita okaze de la intervidiĝo de Prezidanto Maŭ kun la Rumana Milita Delegacio

De la 23-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto, Kolonel-generalo Ion Ionice, ministro de armitaj fortoj de la Rumana Socialisma Respubliko, kaj la Rumana Milita Delegacio sub lia gvido faris amikan viziton al Ĉinio laŭ la invito de Huang Jongŝeng, estro de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.


Dum la vizito de la Rumana Milita Delegacio al nia lando, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun ĝi. Prezidanto Maŭ varme manpremis kun la rumanaj kamaradoj por esprimi bonvenigon kaj faris intiman kaj amikan interparolon kun Kolonel-generalo Ion Ionice, Leŭtenant-generalo Ionel Vasile, Major-generalo Oprica Konstantin kaj rumana ambasadoro al Ĉinio Aurel Duma.

Huang Jongŝeng, estro de la Ĝenerala Stabo, faris interparolon kun Ministro Ion Ionice.

La vizito de la Rumana Milita Delegacio pliintimigis la fratan amikecon kaj kunlaboran rilaton inter la popoloj kaj armeoj de Ĉinio kaj Rumanio.

Varma bonvenigo al la Rumana Milita Delegacio





Prezidanto Maŭ varme manpremas kun kamarado Oh Ĝin Vu.




Foto farita okaze de la intervidiĝo de Prezidanto Maŭ kun la Korea Milita Delegacio



Varma bonvenigo al la Korea Milita Delegacio

# Korea Milita Delegacio Vizitis Nian Landon

De la 25-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto, la Milita Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio kun Armea Generalo Oh Ĝin Vu, membro de la Politika Komitato de la Centra Komitato de la Korea Labora Partio, sekretario de CK de KLP kaj estro de la Ĝenerala Stabo de la Korea Popola Armeo, kiel ĝia estro kaj Kolonelgeneralo Kim Ĉul Man, membro de CK de KLP kaj unua vicestro de la Ĝenerala Stabo de la Korea Popola Armeo, kiel ĝia vicestro, faris amikan viziton al nia lando laŭ la invito de Huang Jongŝeng, membro de la Politika Buroo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj estro de la Ĝenerala Stabo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo.


Dum la vizito de la Korea Milita Delegacio al nia lando, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun ĝi. Prezidanto Maŭ premis la manon al ĉiu korea kamarado de la delegacio kaj varme bonvenigis la koreajn kamaradojn venintajn de la batalfronto kontraŭ la usona imperiismo. Li faris tre intiman kaj amikan interparolon kun la estro de la delegacio Oh Ĝin Vu, la vicestro de la delegacio Kim Ĉul Man kaj ambasadoro Hen Ĝun Ge.

Interparolo okazis inter kamaradoj Huang Jongŝeng k. a. kaj kamaradoj Oh Ĝin Vu k. a.

La vizito de la Milita Delegacio de la Demokratia Popola Respubliko de Koreio faris novan kontribuon al la solidigo kaj disvolvo de la revolucia amikeco kaj batala unuiĝo inter la popoloj kaj armeoj de Ĉinio kaj Koreio.

# Delegacio de la Popola Respubliko de Suda Jemeno Vizitis Nian Landon





Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Salem Robaya *Ali* kore manpremas.

Foto farita okaze de la intervidiĝo de Prezidanto Maŭ kun la Delegacio de la Popola Respubliko de Suda Jemeno

Centoj da miloj da revoluciaj popolanoj de nia ĉefurbo varme bonvenigas la Delegacion de la Popola Respubliko de Suda Jemeno.




De la 1-a ĝis la 13-a de aŭgusto, Salem Robaya Ali, prezidanto de la Prezidanta Konsilantaro de la Popola Respubliko de Suda Jemeno, kaj la Delegacio de la Popola Respubliko de Suda Jemeno sub lia gvido faris ŝtatan viziton al la Ĉina Popola Respubliko.

Dum la vizito de la Delegacio de la Popola Respubliko de Suda Jemeno, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun Prezidanto Salem Robaya Ali kaj ĉiuj membroj de la delegacio. Prezidanto Maŭ varme bonvenigis la kontraŭimperiismajn kunbatalantojn el Suda Jemeno venintajn de la regiono de la Araba Maro kaj faris longan interparolon kun Prezidanto Salem Robaya Ali kaj Ali Salem Al-Beedh, ministro de eksteraj aferoj, en atmosfero de intima amikeco.

Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, faris interparolon kun Prezidanto Salem Robaya Ali. Kaj estis publikigita komuna komuniko de la du landoj.

La honorindaj gastoj de Suda Jemeno vizitis la urbojn Pekino, Ŝenjang, Nankino kaj Ŝanhajo, pririgardis fabrikojn, popolajn komunumojn kaj trupojn de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj kontaktis kaj interparolis kun laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj revoluciaj intelektuloj.

Dum sia vizito, la Delegacio de la Popola Respubliko de Suda Jemeno estis solene kaj varme bonvenigita de la registaro kaj popolo de nia lando. Tio montris la batalan unuiĝon kaj profundan amikecon inter la popoloj de Ĉinio kaj Suda Jemeno.



Prezidanto Maŭ kaj Prezidanto Gaafar Mohamed Nimeri kore manpremas.




Foto farita okaze de la intervidiĝo de Prezidanto Maŭ kun la Sudana Amikeca Delegacio

# Sudana Amikeca Delegacio Vizitis Nian Landon

Centoj da miloj da popolanoj de nia ĉefurbo varme bonvenigas la Sudanan Amikecan Delegacion.




De la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto, Major-generalo Gaafar Mohamed Nimeri, prezidanto de la Revolucia Komanda Konsilantaro, ĉefministro kaj ministro de eksteraj aferoj de la Sudana Demokratia Respubliko, kaj la Amikeca Delegacio de la Sudana Demokratia Respubliko sub lia gvido faris ŝtatan viziton al la Ĉina Popola Respubliko.

Dum la vizito de la Sudana Amikeca Delegacio al Ĉinio, la granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ intervidiĝis kun Prezidanto Gaafar Mohamed Nimeri kaj ĉiuj membroj de la delegacio. Prezidanto Maŭ varme bonvenigis la sudanan delegacion venintan de la araba kontraŭimperiisma fronto kaj faris longan, intiman kaj amikan interparolon kun Prezidanto Gaafar Mohamed Nimeri kaj Ministro Khalid Hassan Abbas.

Ĝoŭ Enlaj, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro de la Ĉina Popola Respubliko, faris interparoladon kun Prezidanto Gaafar Mohamed Nimeri.

La sudanaj honorindaj gastoj vizitis la urbojn Pekino kaj Ŝanhajo kaj pririgardis fabrikojn, popolajn komunumojn, trupojn de la Ĉina Popola Liberiga Armeo kaj lernejojn kaj kontaktis kaj interparolis kun laboristoj, kamparanoj, soldatoj kaj revoluciaj intelektuloj.

Dum sia vizito al nia lando, la Sudana Amikeca Delegacio estis solene kaj varme bonvenigita de la registaro kaj popolo de nia lando.

# En Vasta Kamparo Estas Kulturataj Novaj Homoj

La granda gvidanto Prezidanto Maŭ montris: **"La kamparo estas vasta mondo, kie oni povas multon fari."** Profunde ŝanĝiĝis la ideologia fizionomio de la dek kvar intelektaj gejunuloj el la Dehing-a Mezlernejo de la gubernio Dehing de Gianghi, kiuj soife studas kaj aplikas Maŭzedongpenson, modeste lernas de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj akceptas ilian reedukon, kaj serioze remuldas sian mondkoncepton en la vasta mondo de kamparo. Kvazaŭ junaj pinoj sur Huajju-monto ili sane kreskas sub la brilo de Maŭzedongpenso.

### TRANSPRENO DE LA RUĜA FLAGO DE GINGGANG-MONTARO

Alveninte al Longtoŭ-brigado, tiuj intelektaj gejunuloj estis varme bonvenigitaj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Ankaŭ la estro de la brigada revolucia komitato

*Sub reeduko de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj sane kreskas intelektaj gejunuloj plenaj de freŝa juneco kaj batala entuziasmo.*



Lin Ĵujŝeng estis intelekta junulo fininta kursaron en lernejo antaŭ 13 jaroj. Ekde la unua tago post sia reveno al la hejmloko, li decidis "enradikiĝi en kamparo por fari revolucion kaj dediĉi sian junecon al la popolo". Post hardado en la Granda Proletara Kultura Revolucio, li estas elektita de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kiel estro de la brigada revolucia komitato kaj estas ankaŭ sekretario de la partia filio de la brigado. Li lernis verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun la nove venintaj gejunuloj sub la sama lampo kaj rakontis al ili, kiel li akceptis reedukon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dum 13 jaroj, por atesti per sia persona travivaĵo, ke marŝi laŭ la vojo montrita de Prezidanto Maŭ signifas venkon. Li diris al la gejunuloj: "La arboj en profundaj montoj havas profundajn radikojn kaj la akvo en granda montvalo gustas dolĉe. La vojo, kiun ni iras, estas ja tiu de Prezidanto Maŭ. Iru ni firme kaj senŝanceliĝe ĝis la fino!"

Lin Ĵujŝeng invitis maljunan malriĉkamparanon havantan grandan malamon kontraŭ la malnova socio rakonti al la intelektaj gejunuloj mizeran vivon de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la pasinteco kaj revoluciajn agadojn de la Ruĝa Armeo batalanta siatempe en malfaciloj. Kaj li krome kondukis ilin al la loko, kie revoluciaj martiroj oferis sian vivon, por aranĝi kurson de Maŭzedongpenso. El tio la gejunuloj ricevis tre vivan klasan edukon. Ili esprimis decideme: "Ni transprenos la ruĝan flagon de Ginggang-montaro kaj hardos nin en la ŝtormoj de revolucio!"

Bona tranĉilo akriĝas sur ŝtono kaj bona ŝtalo forĝiĝas en fajro. Laŭ la instruo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"nepre ne forgesi la klasbatalon"**, la brigada revolucia komitato prenis klasbatalon kiel ĉefan lernobjekton por la gejunuloj, lasante ilin sinhardi en ŝtormo de klasbatalo kaj ludi sian rolon. En la tria produkta grupo estis

*Junulinoj en studado*



kontraŭrevoluciulo, kiu penetris en ĝian gvidan kolektivon. Li provis altiri al si la intelektajn gejunulojn per regalado, atribuado de pli da laborpoentoj k.a. La grupestro de la intelektaj gejunuloj Giang Binghuo ĵetis rifuzon rekte al li en la vizaĝon: "Ni venas al kamparo por revolucii sed ne por manĝi kaj vesti bone nek por laborpoentoj." La junuloj laboris sur kampoj tage kaj faris vizitadon vespere al ĉiuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kune kun la malsuprenirintaj kadroj, kiuj venis al kamparo por partopreni fizikan laboron, kaj skribis multe da dazibaŭoj. Post ripetada batalado ili fine eltrenis la kaŝitan malamikon en la produkta grupo kaj ŝanĝis ĝian postrestintan fizionomion. La intelektaj gejunuloj estis harditaj en tiu reala kaj viva klasbatalo kaj faris sian kontribuon en ĝi.

La 14 intelektaj gejunuloj iom post iom malmoliĝis, spertinte klasbatalan ŝtormon.

## "LA SARKILON DE NANNIVAN NI PORTU!"

Longtoŭ-brigado situas en fora angulo kun malpli bonaj naturaj kondiĉoj, kie montpintoj kuniĝas unu kun aliaj kaj oni loĝas dise. La 14 intelektaj gejunuloj, kiuj antaŭe vivis en sia hejmo ne bezonante zorgi pri manĝo kaj vesto, devis trapasi malfacilan provadon por memstare vivi kaj labori farante ĉion per propraj fortoj.

Foje, dum sterkado intelektaj junulinoj Vu Jonghua kaj alia ne volis fari tian laboron abomenante la malpuran kaj malbonodoran bovfekaĵon. Nur post kuraĝigo de maljunaj malriĉkamparanoj, ili nevole laboris iom da tempo. Post la laboro, malsuprenirinta kadro kune kun la gejunuloj ripetade lernis la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, **"ke la ne-remulditaj intelektuloj estas malpuraj kompare kun la laboristoj kaj kamparanoj, ke la plej puraj ja estas la laboristoj kaj kamparanoj, ke ili estas pli puraj ol la burĝaj kaj etburĝaj intelektuloj, malgraŭ ke iliaj manoj estas nigraj kaj iliaj piedoj surhavas bovfekaĵon"**. Ĉiuj vortoj de Prezidanto Maŭ penetris en la koron de ambaŭ junulinoj. Ili malkovris sian burĝaran penson, kritikis ĝin, kaj decidis preni malriĉkamparanojn kaj malsuperajn mezkamparanojn kiel ekzemplon por kulturi en si la bonan virton de penema luktado sub malfacilaj kondiĉoj.

Sub la nutrado de Maŭzedongpenso kaj helpo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la 14 intelektaj gejunuloj komencis ŝanĝiĝi. Giang Binghuo skribis sian firman volon en la taglibro: "Mi nepre venkos malfacilojn por entrepreni ion novan, sed ne serĉos facilan vivon en komforta domo." Ĉiuj esprimis ke ili nepre surportos la sarkilon de Nannivan kaj por ĉiam iros la revolucian vojon de lukto en malfaciloj. Ili iris renkonte al malfaciloj dum laborado kaj prenis tion kiel plej bonan ŝancon por hardi sin.

Ĉi tie la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj delonge pensadis pri konstruado de hidroelektra stacio sed ne realigis ĝin. Informiĝinte pri tio, la gejunuloj proponis al la brigada revolucia komitato, ke oni mem konstruu ĝin apogante sin sur la propraj fortoj. La propono estis akceptita kaj sub la gvido de la revolucia komitato komenciĝis la batalo de konstruado! Sub edifo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj Hiaŭ Miaŭhua, konita kiel "delikata fraŭlino" en sia lernejo, kuris rapide kun nudaj piedoj sur la konstruejo surkovrita de glacia akvo kun ŝarĝo de ĉ. 100 ĝinoj sur la ŝultro. Ĝoje diris malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj: "La delikata fraŭlino fariĝis fera knabino!"

Giang Binghuo hakis brullignon kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en profundaj montoj. Li frue foriris kaj malfrue revenis por pretigi sufiĉan hejtaĵon por fari kalkon. Malgraŭ sangado de la manoj kaj frotvundiĝo de la ŝultroj, li sen paŭzo laboregis pli ol duonmonaton kaj faris pli ol 300,000 ĝinojn da kalko kune kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj per propraj fortoj. La intelektaj gejunuloj meminiciate prenis sur sin la taskojn de starigo de elektraj stangoj, almeto de elektraj dratoj kaj instalo de elektraj lampoj. Post batalado de kelkaj monatoj, fine estis konstruita malgranda hidroelektrejo.

Modeste lernante de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj terkulturan sperton, ili aplikis sian scion en scienca eksperimentado, tiel ke ili fariĝis nova forto de la brigado en tiu sfero. Ĉi tie la montoj estas altaj, la akvo malvarma kaj temperaturo malalta. Oni kulturis antaŭe rizplantojn nur unurikolte kun produktokvanto je duono malpli alta ol ekster la montaro. Ili formis sciencan eksperimentan grupon de triflanka kombiniĝo kune kun veteranaj malriĉkamparanoj kaj malsuprenirintaj kadroj. En la pasinta jaro, la grupo uzis plastan membranon en kulturado de rizplantidoj, ebligante plifruigi la tempon de

transplantado je tri monatoj kompare kun antaŭaj jaroj. Poste estis enkondukitaj bonaj specioj kaj plivastigita la plantareo de malfrua rizo je pli ol 230 muoj, kaj dank' al tio la rizo estis rikoltata dufoje en jaro kun pomua produkta kvanto de 300 ĝinoj meznombre. Krome, la gejunuloj kulturis aparte 1.2 muojn da eksperimenta kampo por elkulturi specion de rapida maturiĝo kaj alta produkto. Ili ankaŭ fabrikis mem kvar specojn de agrikultura drogo kun pli granda efiko por preventi plantmalsanon kaj mortigi fiinsektojn.

La intelektaj gejunuloj en kamparo trovis vastan arenon por sia aktivado.

## ALTE TENU LA TORĈON DE LA LONGA MARŜO

"Alte tenu la torĉon de la Longa Marŝo kaj disvastigu la fajrosemojn de Maŭzedongpenso al ĉiuj anguloj por ke la brilo de Maŭzedongpenso lumigu ĉiujn familiojn." Jen estas la batala ĵuro de la intelektaj gejunuloj.

Veninte al kamparo, ili estis profunde kortuŝitaj de la noblaj kvalitoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj esti senfine fidelaj al Prezidanto Maŭ kaj senkompare varme ami Maŭzedongpenson. Iu maljuna malriĉkamparano, kiu aĝis pli ol 70 jarojn kaj estis iom surda, ripetade petis instrui al li kantojn kun tekstoj el eldiroj de Prezidanto Maŭ por propagandi Maŭzedongpenson. Iu kadro de la brigado ne scianta legi konstante petis helpi lin lerni verkojn de Prezidanto Maŭ ĝis profunda nokto. La gejunuloj trovis la mankantajn al ili kvalitojn de tiuj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj decidis diligente servi al ili per sia klereco kaj dediĉi plene sian forton por propagandi Maŭzedongpenson.

Ĉiam kiam estis publikigitaj novaj instrukcioj de Prezidanto Maŭ ili ekagis ĉe aŭdo kaj kiel eble plej rapide komunikis ilin al ĉiuj familioj de la brigado. Ili formis kulturan kaj artan propagandan taĉmenton kaj sub helpo de malsuprenirintaj kadroj verkis pli ol 20 revoluciajn programerojn. Dum pli ol unu jaro ili faris pli ol 120 prezentadojn por malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Iu malriĉkamparano de la 4-a produkta grupo loĝas kun sia familio sen najbaroj en montoj profundaj por gardi tie plantaĵojn. Por propagandi Maŭzedongpenson ili decidis speciale fari prezentadon por tiu familio. Dum la pasinta printempa festo, sub gvido de brigada kadro la 14 intelektaj gejunuloj komencis la militiron por Maŭzedongpenso tenante alte portreton de Prezidanto Maŭ kaj kun tornistro sur la dorso. Tiam la tero estis frostita, sur rokmuroj pendis glaciaj kolonoj kaj la glaciigita zigzaga montvojeto estis malfacile surpaŝebla ĉe ĉiu paŝo. La montoj estas altaj



*La maljuna malriĉkamparano instruas al ili kiel fari surkampan laboron.*

sed ne tiom kiom la fervoro de la revoluciaj gejunuloj por propagandi Maŭzedongpenson; la nebulo estas densa sed ne tiom kiom ilia entuziasmo por servi al malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj. Spite al la malfacileco kaj danĝero ili fine venis al la domo de la malriĉkamparano post marŝo de pli ol tridek lioj dum pli ol kvar horoj. Vidante la gejunulojn kaj informiĝinte pri ilia celo, la avino karesis iliajn ŝultrojn kaj longe ne povis eldiri eĉ unu vorton. Kun larmoj en la okuloj ŝi laŭte kriis emociite: "Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!" La voĉo longe resonis en la valo sub la pintoj de Huajjumonto.



*Intelekta junulo Ĝoŭ Lang studas la "tri popularajn artikolojn" kune kun la onklino malriĉkamparanino.*

Por helpi komunumanojn en akiro de klereco ili funkciigis en ĉiuj produktaj grupoj politikan vesperan lernejon kaj en la kvina produkta grupo kiu estas plej malproksima de la brigada sidejo elementan lernejon. Iu maljuna malriĉkamparano pli ol 70-jara, kiu ĉiam lernis verkojn de Prezidanto Maŭ ĝis profunda nokto, diris al intelekta junulino Ju Hujkin, prenante ŝian manon: "Kiom ni malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj esperas legi la verkojn de Prezidanto Maŭ! Sed la damninda Kuomintango faris nin analfabetoj, kaj Liu Ŝaŭki denove fermis la pordon de lernejo al niaj idoj. Nun vi venis al ni. Bonege! Kune kun vi mi ĉiutage legos verkojn de Prezidanto Maŭ, legos kaj aplikos liajn verkojn kaj revolucios dum la tuta vivo!" La senlima klasa amo de la maljuna malriĉkamparano al Maŭzedongpenso profunde tuŝis la koron de Ju Hujkin. Kaj ŝi respondis premante la manon de la maljunulo: "Avo, mi nepre lernos verkojn de Prezidanto Maŭ kune kun vi diligente kaj dediĉos mian tutan scion al la kamparo."

En iu venta kaj pluva nokto, apenaŭ intelekta junulo Ĝoŭ Lang surlitiĝis, li subite aŭdis ĝemadon de la onklino malriĉkamparanino en najbara ĉambro. Li tuj rapidis al ŝi kaj vidis ke ŝi ruliĝas sur la lito. La malsano estis sufiĉe serioza. Memorante la instruon de Prezidanto Maŭ **"tutkore kaj tutanime servi al la popolo, neniam disiĝi de la amasoj"**, li tuj surmetis palmŝelan pluvmantelon kaj portis ŝin kune kun ŝia bofilo nudpiede en pluvado al la proksima sanprotektejo. Diagnozo montris ke la malsano estas maligna peritoneito kaŭzita de kronika apendicito, ke oni devas senprokraste porti la pacientinon al hospitalo situanta pli ol 50 liojn fore de la loko por fari operacion al ŝi. Tiam Ĝoŭ Lang jam estis kaj laca kaj malsata, kaj la pluvego ankoraŭ ne ĉesis, tamen, ne pensante pri ĉio ĉi tio li ree piediris pli ol ses horojn kaj portis la malsanulinon al la hospitalo. La maljunulino diris kun larmoj prenante lian manon: "Vi estas pli fileca ol mia propra filo!" Ĝoŭ Lang respondis ekscitite: "Tion instruas al mi Prezidanto Maŭ kaj ankaŭ malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj!" Ĝuste tiel, la 14 intelektaj gejunuloj klopodas servi al la popolo laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ.

En vasta kamparo estas kulturataj novaj homoj! La 14 intelektaj gejunuloj de Longtoŭ-brigado marŝas brave antaŭen laŭ la brila vojo montrita de Prezidanto Maŭ.


LI HIN:

# Nova Vojo de Biologia Fakultato de Ĝongŝan-universitato

EN la komenca periodo de la eduka revolucio iuj instruistoj kaj studentoj opiniis, ke ne estas necese funkciigi la biologian fakultaton, ĉar ĝi servas nek al industrio nek al agrikulturo kaj apartiĝas de politiko kaj praktiko. Aliaj opiniis, ke por lerni industrion estas politeknikoj, por lerni agrikulturon agronomiaj institutoj kaj por lerni kuracarton medicinaj institutoj, sed la biologia fakultato studanta teorion estas por nenia utilo. Ĉu biologio estas senutila? Kiel oni funkciigu la biologian fakultaton?

Por solvi la problemon pri la direkto de funkciigo de la fakultato, sub la gvido de la Laborista kaj ĈPLA-a Propaganda Taĉmento de Maŭzedong-penso laboranta en la universitato, sekvante la instruon de Prezidanto Maŭ **"enketi ja estas solvi problemon"**, la instruistoj kaj studentoj de la biologia fakultato sendis enketajn grupojn respektive al Dongguan, Ŝunde, Ŝaŭguan, Leĉang, Luoding kaj aliaj lokoj kaj tie profundiĝis en fabrikojn kaj vilaĝojn por fari sociajn enketojn. En daŭro de dek monatoj, ili vizitis kultivejojn kaj forstejojn

*Instruistoj kaj studentoj laboras en la eksperimenta agrikulturejo de la universitato.*



de 27 komunumoj kaj brigadoj de 14 gubernioj, kaj post vasta kaj profunda enketado ili venis al la kompreno, ke multaj problemoj en la industria kaj agrikultura produktado atendas solvadon per biologio. Se oni transmetas sian starpunkton al la flankoj de industrio kaj agrikulturo, biologio havas grandan perspektivon.



*Entomologia profesoro observas, kune kun lernantoj, la vivon de platabdomenaj abeletoj.*

Dum socia enketado, la revoluciaj instruistoj kaj studentoj kune kun la amasoj kritikis la reviziisman linion de la malnova biologia fakultato, ke "teorio estas plej supera" kaj instruado kaj scienca esplorado estas por ĉasi personajn famiĝon kaj profiton. Ekzemple, en la universitato oni starigis grandan specimenan ĉambron por la botanika fako en kiu estis kolektitaj pli ol 100,000 vegetaĵoj kaj je la kosto de kelkcent miloj da *yuan*, starigis ankaŭ modernan laboratorion pri insekta ekologio, en kiu estis kolektitaj nemalmulte da insektoj, kaj tie oni dronis tuttage en esploroj, sed ne servis al la produktado. Ju pli la instruistoj kaj studentoj kritikis la reviziisman edukan linion, des pli ili ĝin malamis; kaj ju pli ili kritikis, des pli klare ili vidis, ke intelektuloj rikoltos nenion, se ili ne kombinas sin kun laboristoj kaj kamparanoj, nek serioze remuldas sian mondkoncepton.

Dank' al la revolucia amasa kritikado kaj socia enketado, la vastaj amasoj de la revoluciaj instruistoj kaj studentoj komprenis, ke biologio devas servi al la industria kaj agrikultura produktado. Ili faris decidon sin ĵeti, sub la direktado de la penso de Prezidanto Maŭ pri eduko, en la tri grandajn revoluciajn movadojn de klasa batalo, produkta batalo kaj scienca eksperimento kaj elhaki novan vojon servigi biologion al industria kaj agrikultura produktado.

Sur la bazoj de la vasta socia enketado ili organizis sin en tri praktikajn grupojn de la eduka revolucio pri entomologio, farmacia botaniko kaj biokemia mikrobiologio. Tiuj grupoj iris al fabrikoj kaj vilaĝoj kaj tie funkciigis kursojn por kulturi teknikajn personojn kaj faris praktikadon de eduka revolucio.

La praktika entomologia grupo faranta edukan revolucion en Dongguan-gubernio vaste kolektis opiniojn inter laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, kaj konsidere al reala stato, ke en agrikulturo kaj forstado fiinsektoj ekhavas kontraŭinsekticidan forton pro uzo de insekticido en sinsekvaj jaroj, ĝi kuraĝe prenis ekstermon de fiinsektoj per insektoj kiel esploran temon de entomologio de la biologia fakultato. Kaj ĝi prenis ekstermon de liĉiaj skaraboj per platabdomenaj abeletoj kiel unuan laboron. Unuflanke, la grupo faris sciencajn eksperimentojn pri ekstermo de fiinsektoj sur vastaj areoj en 12 komunumoj, kaj aliflanke ĝi kulturis por kamparo teknikajn personojn de biologia ekstermo de fiinsektoj. Persiste elirante el la aktualaj kondiĉoj de la kamparo, la grupanoj kune kun ili generigis platabdomenajn abeletojn per indiĝenaj metodoj. Sed pro manko de sperto ili renkontis seriojn da demandoj en eksperimentoj. Tion alfrontante,

iuj instruistoj kaj studentoj ekŝanceliĝis kaj konsilis unue kulturi abeletojn en la universitato kaj poste reporti ilin al la kamparo. Post foj-refoja studado kaj esplorado ili komprenis, ke oni povas solvi la problemon de vasta utiligo de la abeletoj en la produktado, nur se oni persistos en la indiĝenaj metodoj. Ĉiuj firme decidis venki malfacilojn, malgraŭ kiom ajn grandaj ili estos. Ili analizis la kaŭzojn de la problemo kaj fine, post foj-refoja esplorado, mastris la leĝojn de grandkvanta generigado de platabdomenaj abeletoj en la kamparo, tiel ke la metodo de ekstermo de liĉiaj skaraboj per platabdomenaj abeletoj akiris rimarkindan efikon kaj ebligis al liĉioj abundan rikolton. Post la eksperimentado la vastaj amasoj de revoluciaj instruistoj kaj studentoj diris kun profunda kompreno: Nur se oni transmetas sian starpunkton al la flankoj de laboristoj kaj kamparanoj, ilia scio estas utila.

Dank' al la praktikoj de eduka revolucio en pli ol unu jaro kaj sub direktado de la penso de Prezidanto Maŭ pri eduka revolucio, la vastaj amasoj de revoluciaj instruistoj kaj studentoj aplikis biologion en industrian kaj agrikulturan produktadon kaj rikoltis en tio relative pli grandan sukceson. Pere de konado, kolektado, prilaborado kaj prova aplikado de ĉinaj kuracherboj, la praktika grupo de eduka revolucio pri farmacia botaniko elfaris diversajn tre efikajn sangohaltigajn medikamentojn, konformajn al bezonoj de militpreparado kaj produktado, malfermis vastajn ĝardenojn por eksperimentado de farmaciaj vegetaĵoj kaj tiel metis fundamenton por starigo de fako de farmacia botaniko. Aplikante la sciojn de biokemia mikrobiologio en eksperimentadon de bakteria kulturado, la praktika grupo de eduka revolucio pri biokemio kaj laboristoj de la fabriko de biokemia mikrobiologio kune elkulturis grandefikecan tetramicinan bakterion, kaj per tio solvis por Guangdong malfacilon en produkto de antibiotiko. Post sukceso de ekstermo de liĉiaj skaraboj per platabdomenaj abeletoj aplikita de la praktika grupo pri entomologio, biologia ekstermo de fiinsektoj rapide disvastiĝis en la kamparo de Dongguan. La grupo helpis multajn komunumojn de Dongguan starigi teknikajn staciojn de biologia ekstermo de fiinsektoj, kaj dank' al forta subteno de la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĝi starigis en la gubernio bazojn de praktiko de eduka revolucio kaj scienca eksperimento. Kaj per tio ĝi faris kontribuon en strikta kombino de la entomologia instruado kun la agrikultura produktado.

*Ili kontrolas, kiel platabdomenaj abeletoj efikas en prevento kaj elimino de liĉiaj skaraboj.*



# La Agrikultura Mezlernejo Gujcun

LA agrikultura mezlernejo Gujcun de Hjuĉang-gubernio estis fondita en septembro de 1963. De post la fondiĝo, sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ ke **"eduko devas nepre servi al la proletara politiko kaj nepre kombiniĝi kun produkta laboro"** kaj sub administrado de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, la lernejo kulturis nombron da novaj fortoj por la socialisma konstruado kaj antaŭenpuŝis la disvolviĝon de la tri grandaj revoluciaj movadoj en la kamparo.

La komenciĝo de la Granda Proletara Kultura Revolucio, precipe la publikigo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ ke **"en la kamparo, la lernejoj devas esti administrataj de la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj — la plej fidinda aliancano de la laborista klaso"** en la jaro 1968, treege kuraĝigis la vastajn amasojn de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Gujcun kaj la revoluciajn instruistojn kaj lernantojn de la agrikultura mezlernejo. Alte tenante la flagon de revolucia amasa kritiko, ili senkompate kritikis la kontraŭrevolucian reviziisman edukan linion de Liu Ŝaŭki, pluapaŝe fortigis la gvidon de la administra komitato de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj super la lernejo, kaj firme tenas la potencon de edukado. Ĉi tie, "lerni por la revolucio" kaj "terkulturi por la revolucio" jam fariĝis nova socia moro. La vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj rigardis kiel sian devon kulturi siajn gefilojn en kamparanojn kaj kontraŭreviziismajn homojn. Ili konkure sendis siajn gefilojn en la agrikulturan mezlernejon.

Sekvante la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ ke **"La lernotempo devas esti mallongigita, revolucio devas esti farita en edukado"** kaj **"kun lernado kiel sia ĉefa tasko, la lernantoj devas samtempe lerni ankaŭ aliajn aferojn"**, la lernejo reformis la malnovan edukan sistemon kaj starigis novan.

La lernejo akceptas laŭ la konsento de administra komitato de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj, en ĉiu ajn tempo lernantojn sen limigo de edukiteco kaj sendiference ĉu la lernantoj estas kadroj aŭ komunumanoj, se nur tion la malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj postulas kaj la tri grandaj revoluciaj movadoj bezonas. La lernantoj akceptitaj povas tuj komenci lernadon, kaj post diplomiĝo ili reiros al la brigado, kiu ilin rekomendis. En la lernejo estas dekkelkjaraj geknaboj kiuj ĉefe akceptas klerigon kaj samtempe lernas aliajn aferojn, estas ankaŭ maljunaj malriĉkamparanoj preskaŭ duoncentjaraj, kiuj lernas specialan teknikon pri greftado de fruktarboj aŭ manipulado de agrikulturaj mekanikaĵoj kaj faras agrikulturan sciencan eksperimentadon. La lernotempo estas tre varia. Por iuj ĝi daŭras du jarojn, por aliaj kelkajn monatojn aŭ eĉ kelkajn tagojn. Ĝi estas difinita ĉefe laŭ la bezono de la tri grandaj revoluciaj movadoj.

En la klasoj longperiodaj oni prenas lernadon kiel sian ĉefan taskon kaj samtempe lernas ankaŭ aliajn aferojn, nome lernante socialisman kulturan kursaron, oni lernas ankaŭ teknikojn bezonatajn de la loko en agrikultura kaj forsta produkto. Post la fino de studado, la lernantoj revenas al sia produkta grupo por partopreni en ĝi produkton kaj laboron.

La lernotempo de mallongperiodaj klasoj estas difinita laŭ la bezonoj de la revolucio kaj produkto. Produktaj grupoj povas sendi kaj revoki la lernantojn en ĉiu ajn tempo laŭ sia bezono. La sepa grupo de Gujhi-brigado bezonis kontiston, la lernejo lasis iun lernanton antaŭdate fini la studon, por ke li povu labori kiel kontisto en sia grupo. Li laboras aktive kaj bone tenas la kontolibrojn. La malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en la grupo tre ŝatas lin. De kelkaj jaroj, laŭ la petoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkam-

paranoj, la lernejo lasis 37 lernantojn antaŭdate fini la studon por ke tiuj laboru en siaj produktaj grupoj kiel grupestro, kontisto, konservisto aŭ milica kadro. Dank' al tio plifortiĝis la konstruo de baza gvidantaro.

La mallongperiodaj klasoj inkluzivas diversajn kursojn por trejni propagandajn fortojn kaj teknikajn laborantojn bezonatajn de produktaj grupoj. En la pasinta vintro, en la kamparo leviĝis la alta tajdo de konstruado de elektrostacio kaj por tio oni bezonis multajn elektristojn. La agrikultura mezlernejo tuj starigis teknikan kurson por kamparaj elektristoj, kulturis 38 elektristojn kaj ĝenerale solvis la malfacilon de manko de elektristoj. Kiam la amasoj volis lerni revoluciajn kantojn, la lernejo tuj starigis tiucele specialan kurson kaj en mallonga tempo kulturis por 28 brigadoj de la tuta komunumo pli ol 400 amatorajn kantistojn.

La lernejo ne faras klasĉambrajn ekzamenojn, kiujn oni antaŭe aplikis al la lernantoj, sed akcentas vivan studon kaj vivan aplikon de Maŭzedongpenso, batalon kontraŭ egoismo kaj kritikon kontraŭ reviziismo kaj sintenon en produkta laboro de la lernantoj en ordinaraj tagoj, por kontroli la rezulton de lernado en praktiko laŭ la principo de kombino de teorio kun praktiko. Ekzemple, por instrui elektran teknikon la lernejo invitis spertan laboriston kiel instruiston. La instruado komenciĝas de projekto, instalo, riparo kaj flego de cirkvito kaj finiĝas en eklumo de elektraj lampoj kaj ekturniĝo de motoro. La instruado kompakte kombiniĝis kun praktikado. Kiam la lernantoj lernas, ili samtempe praktikas, kaj ilia praktikado mem ja estas ekzameno. En lernado de grefto de fruktarboj, oni prenas kiel kompletan ekzamenon la tutan procedon de elekto kaj inokulo de branĉetoj kaj prizorgo de greftaĵoj ĝis ilia sukcesa viviĝo. Kiu serioze kaj respondeceme plenumas la laboron kun alta pocento de sukcese viviĝintaj arbidoj, tiu do trapasas la ekzamenon, alie li daŭrigos la praktikon en la sekvonta jaro. Tia ekzameno ne nur povas pli bone direkti praktikon per teorio kaj riĉigi teorion per praktiko, sed ankaŭ povas pli efike eduki la lernantojn per la revolucia spirito de kompleta kaj senrezerva servo al la popolo. En vintro, kiam la kampaj laboroj estas malmultaj, lernantoj lernas pli multe, kaj en sezono laborplena lernantoj havas feriojn por rekte ricevi edukon kaj provon de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj en produkta laboro.

Dum la lastaj sep jaroj, 158 lernantoj finis sian kursaron en la longperiodaj klasoj de la lernejo. La lernejo funkciigis sinsekve ok mallongperiodajn kursojn sume kun 1,018 kursanoj. La plejparto de la diplomitoj de la lernejo jam fariĝis aktivuloj de la revolucia afero sur diversaj frontoj. En la lastaj jaroj, la agrikultura mezlernejo sendis 35 elstarajn diplomitojn por glore aliĝi al la Ĉina Popola Liberiga Armeo; laŭ rekomendo de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj post sankcio de la supera instanco 18 diplomitoj fariĝis kadroj de bazaj unuoj post reveno al sia produkta grupo; 11 fariĝis helpantoj de komunumanoj en studo de verkoj de Prezidanto Maŭ kaj la ceteraj laboris kiel instruistoj, teknikistoj de agro- kaj arbo-kulturo, elektristoj kaj maŝinistoj, laborpoentaj registrantoj kaj aliaj. Ili estas fidelaj al Prezidanto Maŭ, al Maŭzedongpenso kaj al la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj fariĝis spina forto en plifirmigo de la proletara diktaturo kaj konstruado de la nova socialisma kamparo. Firme tenante en sia koro la instruon de Prezidanto Maŭ **"Nepre ne forgesu la klasbatalon"**, iu diplomito de la agrikultura mezlernejo gvidis en la Granda Proletara Kultura Revolucio la amasojn fari fortan atakon kontraŭ plenmano da klasaj malamikoj kaj malkaŝis en sia produkta grupo profunde sinkaŝintan klasan malamikon. Diplomitoj de la agrikultura mezlernejo vive studas kaj vive aplikas Maŭzedongpenson, la unuaj edifas aliajn per sia ago en ĉiu afero, elstarigas la proletaran politikon kaj multe firmigas kaj fortigas la socialisman pozicion en la kamparo.

Ĉar la agrikultura mezlernejo klare alprenis la orientilon de servo al la tri grandaj revoluciaj movadoj en sia laboro, ĝi fakte fariĝis scienca eksperimentejo de agrikulturo por la komunumo kaj antaŭenpuŝis la teknikan reformon kaj aplikon de sciencaj metodoj en terkulturado. Pri nova teknika reformo en produkto sur grandareaj kampoj, oni unue faras eksperimenton en la lernejo por akiri sperton; progresintaj agrikulturaj teknikoj el aliaj lokoj estas ankaŭ aplikataj unue en la lernejo por poste esti disvastigataj. En iuj brigadoj oni ne kutimis planti maizon, do la lernejo meminiciate prenis sur sin la taskon serĉi sperton de alta produkto de maizo. Post provado en pluraj jaroj, la produktokvanto superis 1,000 ĝinojn en du rikoltoj unujare. En la lastaj kelkaj jaroj, la lernejo enkondukis 70 bonajn speciojn de tritiko, batato kaj aliaj, kaj post eksperimento 26 el ili estas disvastigitaj. Pere de tio estas efike stimulita la disvolviĝo de agrikultura produkto. La agrikultura mezlernejo Gujcun decidis fari plie novajn kontribuojn por konstrui novan socialisman kamparon.

HUANG VEN:


# Vivplenaj Sportistoj

IUTAGE, mirinda artomontra maĉo de tabloteniso prenis lokon en la hela kaj vasta halo de iu fabriko en la suda antaŭurbo de Pekino. Ĝuang Zedong, la ĉampiono de vira unuopa konkurso de la 28-a Tutmonda Tablotenisa Turniro, ludis "tigride" same kiel antaŭe, forte kaj trafe atakante ambaŭflanke ĉe la luda tablo en furiozeco de uragano. Ĝang Hielin, tablotenisisto fame konata pro sia ŝanĝiĝema tranĉfrapado, bone sin defendis kaj sukcese levis foje kaj refoje la pilkon kiam ĝi preskaŭ tuŝis la plankon kaj ĝin resendis per tranĉfrapo. . . .

La ludo prezentis rafinitan arton kaj vekis foje kaj refoje varmegan aplaŭdon de laboristoj. Ili diris: "Ankoraŭ pli mirinde nun ludas Ĝuang Zedong kaj Ĝang Hielin." Ili laŭdis ne nur la novan nivelon de la arto de la sportistoj, sed ankaŭ la noblan spiriton de ili en servo al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili diris: "Kiel bone estas, ke vi venis al ni por fari prezentan ludon. Tio ĉi rezultas el la instruado de nia amata Prezidanto Maŭ."

Dank' al la hardado de la Granda Proletara Kultura Revolucio, tute noviĝis la fizionomio de la vastaj amasoj de sportistoj de nia lando. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **"tutkore kaj tutanime servi al la popolo"**, ili memkonscie iris inter laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn por ricevi reedukon, remuldi sian mondkoncepton kaj servi al la popolo.

Ĉifoje, por fari artoprezentan ludon por la laboristaj amasoj, ili mem transportis la ludotablojn per tricikloj al la fabriko. En mallonga tempo, ili jam faris pli ol 80 artprezentajn ludojn por laboristoj, komunumanoj kaj la Ĉina Popola Liberiga Armeo.



*Eminentaj tablotenisistoj de nia lando interŝanĝas sperton.*

Sub la gvido de la brila proletara sporta linio de Prezidanto Maŭ, la vastaj amasoj de sportistoj de nia lando starigis por si altan noblan aspiron fari eksterordinare bonajn atingojn por glorigi la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ kaj la grandan socialisman patrolandon. Ili verkis novan ĉapitron por la fizikkultura afero de la proletaro.

## SERVI AL LA LABORISTOJ, KAMPARANOJ KAJ SOLDATOJ

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la fizikkulturaj rondoj freneze oponis kontraŭ la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ kaj antaŭenpuŝis la kontraŭrevolucian reviziisman linion.

Ili venenis la animon de la sportistoj per "tekniko en la unua loko", "ĉampionismo" kaj avido al famo kaj profito, kun la vana espero ilin konduki sur la eraran vojon de sindisigo de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj atingi sian kriman celon de restaŭro de kapitalismo.

Foje, iu gimnastika trupo veturis al iu urbo por partopreni konkurson kaj hazarde loĝis en sama gastejo kune kun laboristaj kaj kamparanaj labormodeloj, kiuj partoprenis kunvenon tie. Ĉar la lastaj ne povis rigardi la maĉojn pro manko de libertempo ili petis ke la sportistoj ludu por ili gimnastikon aparte ĉe la loĝejo. Sed la agento de Liu Ŝaŭki en fizikkulturaj rondoj rifuzis la peton pretekstante, ke "ne estas instrumentoj kaj tapiŝo en la gastejo". Kiel netolerebla tio estis en lando de socialisma sistemo!

Komenciĝis la potenca Granda Proletara Kultura Revolucio. Alte tenante la revolucian standardon **"pravas ribelo kontraŭ la reakciuloj"**, la vastaj amasoj de sportistoj faris ĝisfundan kritikon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de la renegato Liu Ŝaŭki.

En iu kritika kunveno, Ĝuang Zedong diris indigne: "'Tekniko en la unua loko' kaj 'ĉam-

*Eminentaj tablotenisistoj de nia lando profundiĝas en amasojn por ilin helpi per artoprezenta ludo.*



pionismo' estas du venenaj sagoj de la burĝaro por ataki la proletaron. Ĝi intencis forgesigi la sportistojn pri la klasbatalo kaj la proletara diktaturo, por ke ili dronu en studo de tekniko kaj ĉasado de famo kaj profito, perdu la orienton de revolucio, 'pace evoluu' senkonscie en aplaŭdoj dum pilkludo, kaj tiamaniere atingi sian kriman celon de restaŭro de kapitalismo en Ĉinio. Tio estas vana iluzio! Ni firme oponas kontraŭ tio." La vortoj de Ĝuang Zedong, plenaj de senlima malamo al la klasaj malamikoj esprimis la komunan koran senton de la vastaj amasoj de sportistoj. Ĉu dum kolektiva trejnado aŭ ĉe konkursejo, la sportistoj ĉiam unue okazigas kunvenon de amasa revolucia kritiko por likvidi la venenan influon de la kontraŭrevolucia reviziisma sporta linio de Liu Ŝaŭki, kaj per la granda teorio de Prezidanto Maŭ pri daŭra revoluciado sub la proletara diktaturo armas sin kaj starigas la noblan ideon servi al la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj sin ekzerci por la revolucio.

En junio de la kuranta jaro, reveninte de sia vizito al Nepalo, la Ĉina Tablotenisa Trupo tuj rapidis al la garnizonejo de iu limgarda trupo en la Tibeta Aŭtonoma Regiono por fari prezenton de sia sporta arto al la karaj ĈPLA-anoj kaj tibetaj kamparanoj, spite al laciĝo. Tiutage, pluvetis kaj nuboj ŝvebis sur la altebenejo de Tibeto 2,000 metrojn super la mara nivelo. Ili veturis al monttalio, kie ili spiris malfacile pro nesufiĉo de aero. Ĝuste tie ili metis la tablotenisan tablon kaj faris artoprezentan ludon por limgarda trupo kaj tibetanoj en pluvo. Kiam ili forlasis la lokon, la reprezentantoj de la trupo kaj tibetaj kamparanoj longe akompanadis ilin kun varma sento, kvankam la lastaj foje kaj refoje petis ke ili haltu. Kaj poste, kiam la Ĉina Tablotenisa Trupo trapasis Kantonon survoje, ili faris kelkajn prezentajn ludojn por laboristoj de tiu urbo, post sia descendo de la aviadilo. En la vespero antaŭ sia forlaso de Kantono, la sportistoj ekpensis pri la servantoj en la hotelo kaj decidis fari artoprezentan ludon por ili. La lastaj diris: "Vi tro laciĝis, do iom ripozu." La tablotenisistoj diris: "Servo al la popolo estas ĝojo por ni, kiel ajn laciga tio estas!"



## GAJNI GLORON POR LA GRANDA GVIDANTO PREZIDANTO MAŬ

Dum koncentra trejnado de la gimnastika trupo, ni eniris en la gimnastikan halon logate de fortepiana muziko. Junuloj kun dikaj brakoj kaj larĝa brusto estis ludantaj sur paraleloj, gimnastikaj ringoj, saltĉevalo ktp. Jen iuj rapide sin levis kiel libeloj ektuŝintaj akvosurfacon, jen iu sin ĵetis en la aeron tiel facile kaj gracie kiel juna hirundo, jen iu subite saltis malsupren kaj firme stariĝis sur la planko kiel vertikale enpikita kudrilo. Ĉe alia flanko, iu sportistino sin ĵetis antaŭen supren, disigis siajn gambojn, transpasis la malaltan stangon de paralelo, ekkaptis la altan stangon, stariĝis sur la brakoj kun la kapo malsupren, poste falis malsupren sin turnante en la aero kaj lerte sin svingis supren kaj malsupren lerte kaj facile kiel drako. . . .

Kun la nobla volo gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la granda socialisma patrolando, la gimnastikaj sportistoj kreis unun post alia multajn altklasajn, malfacilajn kaj novajn movojn. Ili faris ĉiun movon kun la revolucia spirito **"timi nek malfacilojn nek morton"** kaj pene sin ekzercis ĝis sukceso.

Inter la sportistoj, vaste cirkulas la kortuŝa rakonto pri gimnastikisto kamarado Gaŭ Gian,

kiu reakiris sanon post vundiĝo per obstina persistemo kaj persistis en korpoekzercado.

Iun tagon en marto de 1968, kamarado Gaŭ Gian falis de sur reko pro malzorgo, rompis al si vertebron kaj svenis. Li estis tuj portita en hospitalon por savo. Kuracisto faris du truojn en la kranion de Gaŭ Gian por ĝin tiri. Kiam li rekonsciiĝis, li vidis, ke multaj el la kamaradoj de la gimnastika trupo venis vidi lin kaj alportis al li *Vortojn de Prezidanto Maŭ Zedong* kaj brilan portreton de Prezidanto Maŭ. Iuj lin konsolis kaj aliaj kuraĝigis. Li transprenis la ruĝan trezoran libron alportitan de la kamaradoj kaj diris al flegistino, ke ŝi pendigu la portreton de Prezidanto Maŭ sur muron. La konsolo kaj kuraĝigo de la kamaradoj varmigis lian koron. La granda instruo de Prezidanto Maŭ, ke **"tiu ĉi armeo posedas spiriton sentime marŝi antaŭen kaj ĝi nepre faligos ĉiujn malamikojn, sed neniam estos subigita de malamikoj"**, kuraĝigis lin kaj donis al li neelĉerpeblan forton.

Kun senlime profunda proletara amo li fiksrigardadis la brilan portreton de Prezidanto Maŭ kaj antaŭ liaj okuloj aperis unu post alia tragikaj scenoj de la malnova socio.

Lia malriĉa familio loĝis antaŭe en Gaŭgiavilaĝo de Lankju, Huanghian-gubernio, Ŝandongprovinco. Lia avo laboris por bienulo kiel dungito kaj vivis en malsato kaj suferis de frosto malgraŭ penlaborado en la tuta jaro. Poste li fuĝis al Pekino, fariĝis komizo, malsaniĝis je ftizo kaj mortis pro manko de mono por kuracado. Ankaŭ liaj du pliaĝaj fratoj mortis pro manko de mono por kuraci malsanojn. Kiom multe da laborantaj popolanoj, simile al la familio de Gaŭ Gian, en la malnova socio suferis de kruela ekspluatado kaj subpremado sub la reakcia reĝimo kaj baraktadis en malsato kun la Morto!

*Ekzerco sur horizontala trabo*





*Gimnastika ekzerco*

Estas Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, kiuj savis lian familion el la maro de mizeroj kaj havigis al ili feliĉan vivon post la Liberiĝo, kaj de tiam li havis ŝancon lerni en lernejo. Li arde ŝatas sporton, kaj la Partio sendis lin en postlaboran fizikkulturan lernejon, ke li fariĝu gimnastika sportisto.

"Se ne estus Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, same tragika estus mia sorto kiel tiu de la avo kaj la pliaĝaj fratoj. Nun, ĉio mia estas donita de nia amata Prezidanto Maŭ. Mi dediĉos ĉiun tagon de mia vivo al batalo por gajni gloron por Prezidanto Maŭ kaj defendi la proletaran revolucian linion de Prezidanto Maŭ." Kiam lia sanstato boniĝis iom post iom, li petis ke oni alportu al li halterojn kaj sablosaketojn, ke li faru ekzercojn surlite. Poste, por refunkciigi la muskolojn de la kolo li pendigis 20-kilograman balaston sur la kolo. Li faris ekzercadon kun mirinda persistemo. Kaj stimulate de la nobla deziro gajni gloron por Prezidanto Maŭ kaj la socialisma patrolando, fine li denove partoprenis trejnadon de la Ĉina Gimnastika Trupo kaj faris gimnastikan prezentadon por la reprezentantoj de la Naŭa Kongreso de la Partio.

Ankaŭ la rapida kresko de la juna sportistino de la Ĉina Tablotenisa Trupo Ĝeng Huajjing estas relative elstara ekzemplo.

Tiu ĉi knabino el urbo ĉe marbordo de suda Ĉinio estas malgrasa, malaltstatura kaj fortika. Ŝi estas iom hontema kaj neparolema. Sed tiu knabineto ludas tiel brave kaj lerte kiel "bovido" en konkurso.

En la kuranta jaro, kiam ŝi veturis al Nepalo kun la Ĉina Tablotenisa Trupo por partopreni konkurson, ŝi renkontis la fame konatan japanan sportistinon Konno Jasuko. Antaŭ ŝi, Ĝeng Huajjing restis tute aplomba kaj pleniĝis de energio. Per lavanga ofensivo ŝi venkis la faman japanan tablotenisistinon je la rezulto 3:1.

La nobla deziro "gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la granda socialisma patrolando" estas ne nur heroa slogano de la sportistoj de nia lando, sed ankaŭ batala ordono direktanta ilian batalon kaj fonto de energio por krei eksterordinarajn atingojn.

En la naĝo-konkurso lastatempe okazigita por celebri la kvaran datrevenon de la plezura naĝado de Prezidanto Maŭ en Jangzi-rivero, kama-



*En lastatempa kampa kaj voja konkurso, sportisto Ni Ĝikin sukcesis transsalti la altecon de 2.26 metroj, kio estas la plej bona rezulto de monda vira altsalto atingita en la lastaj jaroj.*

rado Je Huanĵong, kiu naskiĝis en akvoriĉa regiono de Guangdong-provinco, rompis la centmetran rampnaĝan rekordon de nia lando je la bonega rezulto de 1 minuto kaj 5.3 sekundoj.

## NOVA SOCIALISMA MORO

En la ĉielblua, ronda Laborista Sporthalo en la orienta antaŭurbo de nia ĉefurbo Pekino, sidis pli ol dek mil spektatoroj por rigardi gimnastikajn ludojn. Sed antaŭ la komenciĝo de la ludoj, subite aŭdiĝis tondra aplaŭdo.

Tiu aplaŭdado estis vekita de tio, ke sportistoj mem purigis la ludejon per ŝvabriloj. Post tio, ili rapide etendis tapiŝon, enportis rekon, paralelon, paralelon kun alta kaj malalta stangoj, gimnastikajn ringojn kaj saltĉevalon. La purigado kaj ĉiuj preparaj laboroj estis faritaj de la sportistoj mem. La nova socialisma moro, ke la sportistoj sintenas kiel ordinaraj laboruloj, estas formita en la Granda Proletara Kultura Revolucio.

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, renegato Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la fizikkulturaj rondoj plenenergie distrumpetis, ke "konkurso estas la plej alta politiko" kaj "konkurso estas ĉio". Por gajni "ĉampionecon", ili ne lasis la sportistojn partopreni fizikan laboron. La purigado de sportejo kaj preparaj laboroj estis faritaj de laboristoj. Nun, la sportistoj ĝisfunde kritikis la reakciajn sensencaĵojn de Liu Ŝaŭki kaj sentas fieron por mem fariĝi ordinara laborulo.

Restigi al si malfacilojn kaj cedi oportunojn al aliaj. Ĉiuj batalantaj por la komuna celo zorgas, amas kaj helpas unu alian. Sennombraj estas ekzemploj pri tio.

Informiĝinte, ke kamaradino Vu Fuŝan klopodas rompi la landan rekordon, sportistino Ĝeng Fengĵong, kiu rompis la mondan rekordon de virina altsalto en 1957, kore ĝojegis kaj speciale alrapidis por purigi la sportejon por ŝi. Fame konata altsalta sportisto Ni Ĝikin strebis al bonega atingo por gajni gloron por la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. Dum la koncentra trejnado, la vojaj kaj kampaj sportistoj stimulis kaj helpis unu alian per konsiloj. Ili rigardis la malfacilojn de Ni Ĝikin kiel siajn proprajn. Ne malmultaj homoj studis kun li verkojn de Prezidanto Maŭ, helpis lin eltrovi la ĉefan kontraŭdiron kaj elmetis proponojn por ĝin solvi, tiel ke li transsaltis la altecon de 2.26 metroj en malfacila cirkonstanco de pluvado kaj kreis la plej bonan rezulton de vira altsalto de la mondo en la lastaj jaroj.

Ĉiufoje, kiam vastaj amasoj de sportistoj de nia lando iras profunde en fabrikojn, kamparojn kaj armeajn trupojn kun litaĵoj kaj sportaj instrumentoj por akcepti reedukon de laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj kaj varme faras sportajn prezentojn por laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, ili varme propagandas la grandajn instruojn de Prezidanto Maŭ, kia **"disvolvu sportajn aktivadojn kaj plifortigu la fizikan kvaliton de la popolo"** kaj instruas sportajn teknikojn al laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj. Ili helpas la laboristojn, kamparanojn kaj soldatojn kulturi aktivulojn en sporto kaj disvolvi amasajn sportajn aktivadojn kaj estas varme bonvenigataj de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj.

# Kinghua-universitato — Novtipa Socialisma Universitato de Inĝenier-scienco

Sub la intima zorgo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ kaj la Centra Komitato de la Partio kun Prezidanto Maŭ kiel la estro kaj Vicprezidanto Lin kiel la vicestro, la laborista kaj ĈPLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso en Kinghua-universitato gvidas la revoluciajn instruistojn, studentojn, oficistojn kaj laboristojn de la universitato krei socialisman universitaton de inĝenier-scienco praktikante la penson de Prezidanto Maŭ pri proletara eduka revolucio, kun la Maj-sepa Instrukcio kiel sia programo kaj akiris certan sperton.

Ĉi tiuj fotoj montras facetojn de la vigle disvolviĝanta eduka revolucio.

*Bonvenigo al novaj lernantoj*





*Aŭskultado de lekcio*


*Maljuna laboristo Guj Jupeng donas lecionon.*



Instruisto, membro de la laborista propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso kaj lernantoj interkonsiliĝas pri instrua materialo.




Laŭ la bezonoj en la socialisma konstruado kaj instrua laboro, Kinghua-universitato turnis siajn dependajn mezgrandajn kaj malgrandajn fabrikojn en bazojn por instruado, scienca esploro kaj produktado en kombino. Jen aŭtoj produktitaj de ĝia aŭtofabriko.







*Kamaradoj de la Laborista Propaganda Taĉmento de Maŭzedongpenso en la universitato korverŝe interparolas kun novaj lernantoj.*



*Profesoro Caj Hjuansan de la fakultato de elektraj maŝinoj donas lecionon al siaj gestudentoj en praktiko en la Fabriko de Metalurgiaj Aparatoj, provante novan produktaĵon.*

# Prezidanto Maŭ — Savanto de Kucongoj

*Prezidanto Maŭ estas savanto de l' kucongoj,*
*Maŭzedongpenso estas nia vivradiko.*
*Estas multaj padoj en la praarbaro,*
*Nur la voj' de Prezidanto Maŭ kondukas al feliĉo.*

Supre estas popolkanto de kucongoj, naciminoritatoj vivantaj en Junnan ĉe landlimo, per kiu ili varme prikantas la grandan gvidanton Prezidanton Maŭ.

Entute pli ol tri mil kucongoj vivas en la montaro Ajlaŭ, Ginping-gubernio, Junnan. Antaŭ la Liberiĝo, sub la premado de imperiismo, kuomintangaj reakciuloj, lokanaj oficistoj kaj ĉefoj, ili vivis mizeran vivon en la montoj: vesti sin per arbofolioj, manĝi bestan karnon kaj sovaĝajn fruktojn, loĝi en kabanoj tegmentitaj per baŝofolioj kaj vivi de generacio al generacio en mallumo. Post la Liberiĝo Prezidanto Maŭ sendis tien ĈPLA-anojn por ekstermi plene la postrestantajn kuomintangajn banditojn kaj savi kucongajn fratojn el suferoj. Kamaradoj ĈPLA-anoj kaj lokaj diversnaciecaj kadroj pene venkis multajn malfacilojn dum kvin jaroj por serĉi la kucongajn fratojn unu familion post alia dise loĝantajn en la densa kaj vasta praarbaro kaj fikse loĝigi ilin en 31 vilaĝoj ĉe la piedo de Ajlaŭ-montaro en 1957.

Kiam la kucongoj forlasis la arbaron por translokiĝi al la novaj kucongaj vilaĝoj, la havaĵo de ĉiu kuconga familio estis enmetebla en sola dorskorbo. Kiel ŝanĝi la malriĉan kaj senhavan fizionomion de la kucongoj? La granda gvidanto Prezidanto Maŭ instruis al ni: **"Nur socialismo povas savi Ĉinion."** Sub la gvido de la tri ruĝaj standardoj de la ĝenerala linio, granda antaŭensalto kaj popola komunumo, la kucongaj revoluciaj amasoj decideme sekvis la vojon montritan de Prezidanto Maŭ. En 1958 en la vilaĝoj de kucongoj estis fonditaj la unuaj agrikulturaj kooperativoj kaj multaj interhelpaj grupoj. Grandan vivipovecon tuj montris tiuj socialismaj burĝonoj ĉe sia ekapero. En la pasinteco la sola agrikultura agado, kiun faris kucongoj en la praarbaro, estis plantado de maizo en primitiva maniero. La rikolto sufiĉis por konsumado nur en tri monatoj eĉ al familio, kiu plej multe rikoltis. Ili neniam plantis rizon. Post starigo de kooperativoj, dank' al la kolektiva forto, ili fosis 27 kanalojn en Ajlaŭ-montaro kaj konstruis rizkampojn. Krome, ili plantis unuafoje kotonon kaj sukerkanon kaj aliajn ekonomiajn plantaĵojn, tiel ke ĉiuj kucongaj familioj komencis nutri sin per rizo kaj multaj el ili unuafoje vestis sin per vestoj el memfaritaj teksaĵoj. La ok kucongaj familioj de la vilaĝo Caŭguoping akiris riĉan rikolton jam en la unua jaro post fondo de la kooperativo en 1958. En la bolante leviĝanta alta tajdo de la granda antaŭensalto, aperis kaj hardiĝis grandnombraj aktivuloj por iri firme la socialisman vojon. Naskiĝis ankaŭ la unua generacio de kompartianoj — pioniroj de la proletaro por la kucongoj.

En 1961, kiam la kucongaj fratoj banis sin en la varmaj radioj de Maŭzedongpenso kaj marŝis sur la granda vojo de socialismo, la nigra vento de kapitalisma restaŭro levita de la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki atingis Ajlaŭ-montaron. Liaj agentoj en Junnan kaj Ginping deklaris absurde ke "la limregiono havas siajn apartajn kondiĉojn" kaj "la naciminoritatoj troviĝas en subevoluinteco", kaj devigis la kucongojn forlasi la vilaĝojn kaj reiri en la praarbaron por sin vivteni per ĉasado.

Kiom la kucongoj sopiris pri la granda savanto Prezidanto Maŭ en tiuj doloraj tagoj! La kuconga maljunulo Ĝi-aki elprenis sian zorge konservitan insignon kun portreto de Prezidanto Maŭ kaj ĝin rigardis kaj rigardadis kun koro plena de espero. Certe la amata Prezidanto Maŭ denove sendos por savi la kucongojn el la praarbaro en iu tago!

La sopirata tago fine venis. La arda fajrego de la Granda Proletara Kultura Revolucio persone iniciatita kaj gvidata de la granda komandanto Prezidanto Maŭ atingis ankaŭ la limregionojn de la patrolando kaj forpelis la densajn plumbajn nubojn super Ajlaŭ-montaro. Prezidanto Maŭ

alsendis la karulojn ĈPLA-anojn duafoje en la montojn por serĉi la kucongojn kaj propagandi al ili Maŭzedongpenson.

Multaj ĈPLA-anaj propagandaj taĉmentoj de Maŭzedongpenso venis profunde en la arbaron al kabanoj de kucongoj kun verkoj de Prezidanto Maŭ. Ili portis al la kucongoj novajn portretojn de Prezidanto Maŭ, liajn revoluciajn trezorajn verkojn kaj la sinceran zorgemon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ. "Vivu Prezidanto Maŭ!" "Prezidanto Maŭ, vi estas ruĝa suno neniam subironta en nia koro!" Kun varmaj larmoj en la okuloj aklamis nereteneble la kucongoj en la arbaro.

Sub la helpado de ĈPLA-anoj la kucongoj denove forlasis la praarbaron. Tenante la revoluciajn trezorajn verkojn en siaj manoj, ili demandis ĈPLA-anojn: "Ĉu ĉiuj vortoj de Prezidanto Maŭ troviĝas en ili?"

"La libroj ĉiuj konsistas el instrukcioj de Prezidanto Maŭ."

"Kian instrukcion donis Prezidanto Maŭ pri kooperativoj?" La kucongoj ne povis forgesi la socialisman vojon.

La ĈPLA-anoj do lernis kune kun ili frazon post frazo la brilan verkon de Prezidanto Maŭ *Pri la Problemo de Agrikultura Kooperigo.* Ju pli la kucongoj aŭskultis, des pli klariĝis ilia menso, ĉar ĉiuj vortoj kaj frazoj vibris tra iliaj koroj.

En ĉiu el la 20 nove formitaj kucongaj vilaĝoj en la montaro, fondiĝis vesperaj lernejoj por lerni Maŭzedongpenson. La kuconga junulo Huang Hiaŭer el la vilaĝo Daki, kiu estis malsana, ne povis sidi kaj stari facile. Tamen, aŭdinte ke en la vilaĝo ekfunkciis la vespera lernejo, li venis per helpo de lambastono al la lernejo por partopreni la lernadon kaj rakontadon pri apliko de Maŭzedongpenso. Kun revolucia persistemo li lernis parkere la "tri popularajn artikolojn" kaj dekojn da vortoj de Prezidanto Maŭ kaj fariĝis aktivulo de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso.

*Kuconga propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso faras prezentadon.*





*Li Pulong, ano de la Konstanta Komitato de RK de Ginping-gubernio (la tria de dekstre), estas kucongo. Jen li interŝanĝas komprenaĵon pri verkoj de Prezidanto Maŭ, kun malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj dum laborpaŭzo.*

Maŭzedongpenso akrigis la okulojn de la kucongoj, tiel ke ili povas klare distingi bonulojn disde malbonuloj kaj diferencigi klare la du liniojn. La vastaj amasoj de kucongaj fratoj ekkomprenis ke estis la proletara linio de Prezidanto Maŭ kiu dufoje kondukis la kucongojn el la praarbaro por havi fiksan loĝejon, kaj ke tiu estis la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki, kiu repelis ilin en la praarbaron sur la profundaj montoj. Ili ne povis subpremi sian indignon kaj malfermis amasan revolucian kritikon. En la kritika kunveno okazigita en la subdistrikto Citongba, ĉe unu flanko de ĝia ejo estis montritaj sovaĝaj herboj kaj dekoj da specoj de fruktoj kiujn ili manĝadis en la praarbaro, vestojn el baŝofolioj kaj plugiletoj el ligno, kiujn ili portis kaj uzis; en la alia flanko oni povis vidi revoluciajn trezorajn librojn, ferajn agrikulturilojn, vatitajn litkovrilojn kaj novajn vestojn, kiujn ili legas kaj uzas post la forlaso de la praarbaro kaj fiksloĝiĝo. La kuconga maljunulo Gi-aki indigne akuzis pri la krimoj de la granda renegato Liu Ŝaŭki: "La granda gvidanto Prezidanto Maŭ savis mian familion el morto, sed Liu Ŝaŭki nin repuŝis al morto. Dum la longaj kvar jaroj, en kiuj ni ree vivis en la praarbaro, unu el miaj fratoj falis morta de sur arbo, kiam li kolektis sovaĝajn fruktojn. La vivon de mia alia frato kaj miaj du filoj forrabis malsano. Liu Ŝaŭki estas morta malamiko de ni kucongoj. Lin ni devas trakti kiel leopardon!"

La incendio de amasa revolucia kritiko envolvis la montaron Ajlaŭ kaj la fervoro de la kucongoj por iri la socialisman vojon fariĝis ĉiam pli arda. Estis jam profunda nokto, sed en la novaj loĝejoj de la kucongoj oni ankoraŭ varme diskutis pri problemoj koncerne al organizado de kooperativo.

Post diskutado iuj kucongaj familioj iris anonci sin por aliĝi al kooperativo en la sama nokto. Iuj kucongaj fratoj kune sendis reprezentantojn por peti helpojn de ĈPLA-anoj en organizado de kooperativo. Por vidi la lastajn, la reprezentantoj devis iri kelkdek liojn da montvojeto. La torento de socialismo ruliĝis nebareble antaŭen.

Nun, sub la gvida principo de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"teni la revolucion, stimuli la produkton"**, ĉie en la 20 novaj vilaĝoj de kucongoj en la montregiono de Ajlaŭ kun areo de centoj da lioj aperis la batalaj scenoj de kucongoj, kiuj luktas por ŝanĝi la naturon. Ĉie leviĝas iliaj revoluciaj kantoj. Brave marŝas antaŭen la kucongoj laŭ la revolucia direkto montrita de la granda stiristo Prezidanto Maŭ.

# La Geologia Taĉmento 909

SEKVANTE la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **"rompi fremdlandajn rutinajn regularojn kaj iri nian propran vojon por disvolvo de industrio"** en la Granda Proletara Kultura Revolucio, la vastaj revoluciaj amasoj de la geologia taĉmento 909 en Gianghi-provinco disvolvas la revolucian spiriton de Ginggang-montaro, faris revolucion en la geologia laboro kaj elhakis vojon por entrepreni geologian laboron multe, rapide, bone kaj ekonomie.

En la kvar jaroj de la Granda Proletara Kultura Revolucio, tiu taĉmento elmetis 14 geologiajn raportojn al la ŝtato. Altrapide ili plenumis esploradon de kvar min-areoj de multspecaj raraj metaloj kaj per tio faris kontribuon por kontentigi urĝan bezonon de la konstruo de la lando; ili altkvalite finesploris grandan sal-minejon kaj finis la historion de sensaleco de Gianghi; ili trovis minejon de bitumkarbo en la provinco kaj tiamaniere ŝanĝis tiun longe ekzistantan staton de uzado de karbo transportita el norda Ĉinio.

En la pasinteco cirkulis la aserto, ke "en la ruĝa tertavolo de Gianghi ne troviĝas mino" kaj neniu geologia laboranto provis serĉi minon en tiu tertavolo.

Ĉu vere ne troviĝas mino en la ruĝa tertavolo de Gianghi-provinco? Kun tiu problemo la revoluciaj laborantoj de la taĉmento 909 foje kaj refoje studis brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Praktiko* kaj *De Kie Venas la Korektaj Ideoj de la Homo?* kaj ekkomprenis, ke sen praktikaj serĉado kaj esploro de mino, oni ne povas havi ĝustan konon pri la stratumoj. Sub la direkto de la filozofia penso de Prezidanto Maŭ, ili decidis ataki la ruĝan tertavolon por akiri trezoron de ĝi. Iu min-serĉa grupo elektis por si malgrandan basenon, profundiĝis en la amasojn por enketado, vizitis entute pli ol 3,000 popolanojn, esploris 50 putojn kaj fontojn, analizis kaj komparis la tertavolajn ŝanĝiĝojn de 10 areoj kaj kolektis grandan nombron da sciencaj donitaĵoj. Post serioza studo, ili unuapaŝe konstatis, ke tiu longa kaj mallarĝa baseno, kvankam kun malgranda areo, tamen estas tre profunda, kaj estis malalta marbaseno bone enfermita kun multaj signoj de formiĝo de mino kaj bonaj kondiĉoj por precipito kaj konservo de mino. Ili sekve decidis fari profundan boradon kaj post laboro de pli ol tri monatoj trovis en tiu malgranda baseno grandan salminejon kiu povas provizi sufiĉe da salo al la tuta loĝantaro de Gianghi por miloj da jaroj kaj riĉan minon de kupro. Kaj sub alia ruĝa tertavolo ili trovis tre bonkvalitan minon de bitumkarbo. Levante blankan salon per ambaŭ manoj, lokaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ekmemoris la mankon de salo en la malfacilaj jaroj de la enlanda revolucia milito, kiam la kuomintanga reakciularo kondukis ekonomian blokadon kontraŭ ili, kaj laŭte kriis kun varmaj larmoj en la okuloj: "Vivu, longe vivu Prezidanto Maŭ!"

En la pasinteco, oni ĉiam rigide difinis la borpunktojn en fiksaj distancoj en linioj formantaj reton por fari esploron de kia ajn mino, en kia ajn tereno kaj ĉe kiaj ajn eksterordinaraj cirkonstancoj, kaj pro tio multe da homfortoj, materio kaj tempo estis malŝparitaj. Poste, kiam iu grupo de la taĉmento esploris iun minon de rara metalo, ĝi serioze analizis la karakterizaĵojn de tiu mino laŭ la instruoj de Prezidanto Maŭ **"fari specifan analizon pri specifa afero"** kaj **"difini niajn laririentilojn laŭ efektivaj kondiĉoj"**, kaj trovis, ke la mino kovras vastan terenon, ĝia kvalito estas stabila kaj la dikeco de ĝi varias laŭ la terformo, nome dika ĉe la montsupro kaj ju pli malsupre des malpli dika ĉe la malsupraj partoj. Laŭ la konkreta stato, ili elektis malsamajn altecojn por aranĝi la min-esploran laboron kaj plibonigojn al la projekto dum la esplorado. Dank' al tia aranĝo, nur en du jaroj kaj unu monato ĝi jam finesploris la grandan minon de rara metalo, por kio oni devus uzi 5-6 jarojn laŭ fremdlanda maniero kaj 60 pocentoj de laboro estis ŝparitaj.

Geologia raporto estas frukto de esplora laboro kaj bazo por projekto de ekspluato de mino. Laŭ rutina maniero, la geologiaj raportoj devas havi fiksitajn ĉapitrojn, ĉu granda aŭ malgranda estas la mino, ĉu longa aŭ mallonga estas la labora tempo;

en ili fremdlanda literaturo devas esti citita kaj diversaj geologiaj desegnoj devas esti aldonitaj. Pli ol unu jaron oni devas uzi por skribi raporton pri tri-jara esplora laboro kaj el tia verko kun centmiloj da vortoj vere utilaj estas nur malmultaj frazoj. Laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ, la taĉmento 909 klopodas por apliki materiisman dialektikon kaj oponas kontraŭ metafiziko kaj skolastiko. Skribante novan geologian raporton, ĝi persistas en teno de Maŭzedongpenso en komando kaj elstarigo de proletara politiko; ĝi persistas en praktiko de amasa linio kaj donas la skizon kaj plenan tekston al la amasoj por diskuto; ĝi persistas en tio, ke la raporto konformu al la efektiva bezono, kaj estu lakona, klara kaj facile komprenebla por la amasoj. Post senĉesa provado kaj perfektigo, finfine ĝi kreis tute novan specon de revolucieca geologia raporto. La geologiaj raportoj verkitaj de ĝi en la lastaj jaroj entenas po 5,000 ĝis maksimume 20,000 vortoj, kaj tiaj raportoj estis elverkitaj en nur unu semajno ĝis unu monato post la esplora borado, kio ricevas laŭdon de la koncernaj unuoj de konstruado.

Sinteza serĉado de mino kaj sinteza juĝo pri minerala lito estas efektiva plenumo de la instrukcio de Prezidanto Maŭ pri multflanka utiligo, ĝi estas grava vojo por entrepreni geologian laboron multe, rapide, bone kaj ekonomie.

En la pasinteco, Liu Ŝanki kaj liaj agentoj en la geologia branĉo kopiis senŝanĝe "fremdlandajn dogmojn" kaj permesis al ĉiu esplora grupo serĉi unu specon de mino unuflankece emfazante "specialiĝon". Se iu grupo trovis en iu regiono aliajn minojn, ĝi estis malpermesata fari esploron pri ili; se ĝi trovis akompanan minon, ĝi ne taksis ĝin; grupo, kiu sin okupas pri serĉado de karbo, ne zorgas pri serĉo de fera mino, kaj grupo, kiu sin okupas pri serĉado de fera mino, ne zorgas pri serĉo de karbo, kaj ofte okazis ke en unu regiono laboris samtempe pluraj grupoj de speciala okupo, kiuj ripetis saman laboron foje kaj refoje. Tio ne nur kaŭzis seriozan malŝparon de tempo, homfortoj kaj materio, sed ankaŭ obstrukcis la ekspluaton de multaj valoraj subteraj riĉfontoj kaj malbone influis al racia dislokado de industriaj konstruoj kaj multflanka utiligo de minaj riĉfontoj.

La taĉmento 909 rompis la malnovan regulon de serĉo de unu speco de mino kaj praktikas sintezan serĉadon kaj sintezan taksadon de minoj. En la pasintaj 4 jaroj, tiu taĉmento ludis rolon de pluraj geologiaj taĉmentoj de aparta okupo, disvastigis sian agadkampon de serĉado de unu speco de mino al serĉado de 18, turnis sol-produktan minon en plur-produktan, mortan minon en vivan kaj "malriĉan" minon en riĉan. En la pasinteco, ĉar oni serĉis nur unu specon de mino, trovita mino en iu regiono estis kondamnita al "morto", pro tio ke ĝi estas malaltkvalita kaj ne taŭgas por ekspluatado. De kiam sinteza serĉado kaj sinteza taksado de minoj estas energie kondukataj, oni trovis, ke tiun minon akompanas aliaj kvin specoj de minoj de urĝe bezonataj raraj metaloj, el kiuj iuj estas tre riĉaj. Kaj en tiu regiono, ili trovis ankaŭ 11 specojn de mino inkluzive de fero, karbo, kupro, fosforo kaj helpa materialo por produkto de ŝtalo.

En sia praktikado ili profunde konis, ke minoj ĉiuj estas interligitaj aŭ kunekzistantaj kaj absolute ne ekzistas unuopa mino. Serĉo de unu speco de mino ne konformas al la objektiva realo, tia homfarita apartigo de kompleksaj, multspecaj subteraj riĉfontoj, kiu celas elpreni nur unu el la valoregaj subteraj riĉfontoj forlasante la aliajn, estas laŭ la principo "malmulte, malrapide, malbone kaj malŝpare". Nur per sinteza serĉo kaj sinteza takso de minoj, oni povas plene ekspluati kaj utiligi subterajn riĉfontojn, subteni la konstruadon de la ŝtato, kontentigi la bezonojn de minaj riĉfontoj por starigo de loka industria sistemo kaj atingi la principon "multe, rapide, bone kaj ekonomie".

La popolamasoj estas la mastroj de la tero, kiuj tre bone konas la historion de sia loko kun la montoj, riveroj kaj aliaj objektoj. Iliaj spertoj pri konado kaj serĉado de minoj akumulitaj en sia longa produkta batalo estas multe pli riĉaj kaj konkretaj ol la enhavoj de libroj. Por akiri plenan konon pri kompleksa stato de vastaj subteraj riĉfontoj, oni nepre devas rompi fremdlandajn rutinajn regulojn, energie konduki amasan movadon kaj mobilizi la amasojn raporti pri minoj. Minserĉaj grupoj plurfoje vizitis iun regionon kaj fosis nemalmultajn fosaĵojn, sed ne trovis minon. Poste, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kondukis minserĉantajn laborantojn al iu montodeklivo kaj diris al ili, ke ili elfosis karbon tie en King-dinastio, kaj fine ili rapide trovis tie karbominon. Profesiaj laborantoj faris kun geologia mapo plurjaran esploradon pri la subteraj riĉfontoj de iu gubernio, sed ne sukcesis akiri plenan konon pri ili. Malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kritikis ilin dirante: "Vi ne devas vin apogi nur sur la mapo, ĉar la minoj kuŝas subtere, sed ne sur la mapo." Poste ili laboris sin apogante sur la amasoj kaj akiris plenan konon pri la subteraj riĉfontoj de la gubernio en nur unu monato.

Dum sia mobilizo de la amasoj por raporti pri minoj, la taĉmento 909 elstarigis proletaran politikon, propagandis Maŭzedongpenson, klarigis la gravan signifon de serĉado de minoj por la revolucio, modeste lernis de la amasoj kaj aktive faris politikan laboron inter ili. En la pasinteco, tiu taĉmento trovis neniun novan min-punkton en ok jaroj, sed nun dank' al helpo de la amasoj, ĝi jam trovis 29 punktojn taŭgajn por esplora bazloko. Grandajn minojn, kiujn ĝi ne povis trovi en pluraj jaroj, nun ĝi trovis en kelkaj monatoj aŭ eĉ kelkaj tagoj. Dum serĉado de karbo, iu min-serĉa grupo kredis nur inĝenieron en la komenco kaj faris sinsekve tri bortruojn vane, sed poste ĝi faris boradon laŭ la opinio de spertoriĉa malriĉkamparano, sukcesis trovi karbon en ĉiu bortruo. Kun profunda kompreno el la sperto, geologiaj laborantoj diris: "Sinapogante sur la amasoj, ni vidas kvazaŭ kun teleskopo, dum sindisiginte de la amasoj, ni fariĝas blindaj."

La taĉmento 909 firme decidis pli alte teni la grandan ruĝan standardon de Maŭzedongpenso kaj batali por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn en serĉado de multaj kaj riĉaj minoj.




## RIĈA RIKOLTO DE TABAKO

Forte tenante la revolucion kaj energie stimulante la produktadon, la vastaj amasoj kaj kadroj de la regiono Hjuĉang de Henan-provinco, kiu estas fame konata produktejo de tabako en nia lando, batalakiris riĉan rikolton de tabako en la kuranta jaro. La kvalito de la rikoltita tabako superis tiun de ĉiu ajn jaro en la historio.

En aŭgusto, la tabakproduktejoj de Hjuĉang eniris la sezonon de rikoltado kaj bakado de tabako. La tuta tabakokultura regiono ore flavis. En la vastaj etendaĵoj de tabakaj kampoj, la plantoj en netaj vicoj estis altaj kun fortikaj tigoj kaj grandaj dikaj folioj. Aperis granda nombro da avangardaj komunumoj kaj brigadoj, kiuj turnis sian malaltan produkton en altan, pliigis sian altan produkton kaj efektivigis duoblan riĉan rikolton de greno kaj tabako kaj duoblan kontribuon, tiel en la koncentraj kiel en la nekoncentraj areoj de tabako, tiel en la novaj kiel en la malnovaj areoj.

En la batalo por akiri riĉan rikolton de tabako en la kuranta jaro, la vastaj amasoj de komunumanoj en la regiono Hjuĉang sturmis por solvi teknikajn problemojn por atingi bonegan kvaliton kaj altan produkton de tabako kun obstina revolucia spirito, kreis kaj disvastigis serion da novaj teknikoj en kulturado de plantidoj, transplanto, surkampa flegado kaj bakado de tabako, ĝustatempe venkis diversajn naturajn katastrofojn minacantajn la produkton de tabako, kiaj trosekeco, fiinsektoj kaj hajlo, eltrovis leĝon en produkto de tabako, tiel ke ili tenas la iniciativon en batalakiro de altkvalita kaj alta produkto de tabako.

## MALPEZA KINEMATOGRAFO

Dank' al energia kunlaboro de frataj fabrikoj, la laboristoj de la Kinematografa Riparejo de Ninghia sukcese provfabrikis lastatempe malpezan kinematografon por 8.75 milimetraj filmoj kun la marko "Liupanŝan" kaj tiel kreis favoran kondiĉon por disvolvi la kinan aferon de la aŭtonoma regiono, popularigi la kinoprezentan laboron en la kamparo kaj precipe en la montregiono kaj pli bone propagandi Maŭzedongpenson.

La aparato estas malgranda kaj malpeza kaj povas projekcii filmojn kaj lumbildojn. Por ĝi oni aplikis la avantaĝojn de aliprovincaj kinematografoj kaj faris kuraĝajn plibonigojn laŭ la postuloj de tieaj kamparo kaj montregiono, kiel ekzemple aldonon de kovrilo kontraŭ ŝablovento. La generatoro estas fiksita sur biciklo kaj la tuta kompleto de ekipaĵoj estas transportebla por unu homo. La biciklo povas esti uzata ne nur kiel veturilo sed ankaŭ kiel ilo por funkciigi la generatoron kiu liveras elektron al la kinematografo. La transmisia mekanismo estas reguligebla kaj riparebla, se nur oni deprenas 4 boltojn. La megafona aparato estas transistora kaj povas esti uzata ankaŭ por ricevi radion aŭ disaŭdigi gramofonajn diskojn.

SONG VEN:

# Granda Venko de la Projekto por Jungi Huajhe

SUB la inspiro de la granda alvoko de Prezidanto Maŭ **"Nepre jungu Huajhe"** granda akvojunga projekto estis kompletigita lastatempe sur Huajbej-ebenejo, norde de Huajhe en nia lando. Tiu projekto komencita dum la Granda Proletara Kultura Revolucio inkluzivas la laborojn fosi novan kanalon kaj plivastigi la riveron Tuohe, branĉon de Huajhe. La 250-kilometra akvovojo formita el la nove fosita kanalo ligita kun la dragita Tuohe estas pli larĝa kaj pli longa ol la Panama Kanalo aŭ Suezo. La elfosita tero sufiĉas por konstrui muron unu metron altan kaj unu metron dikan, kiu povas ĉirkaŭi la ekvatoron 2.5-foje. La popolo de Huajbej-ebenejo konsideras ke la akvovojo, kiu trapasas la tri provincojn Henan, Anhuj kaj Giangsu, estas granda venko de la proletara revolucia linio de Prezidanto Maŭ.

La nove fosita kanalo, kiu estas nomata Hinbianhe, kaj la plivastigita Tuohe estas treege gravaj

*Sur laborejo de Huajhe, vastaj amasoj de popolanoj forte kritikas la reviziisman linion de la renegato Liu Ŝaŭki.*



por likvidi la katastrofplenan historion de Huajhe. Huajbej-ebenejo kliniĝas de okcidente orienten. Ĉar la flukvanto de la ĉefaj defluaj riveroj Tuohe kaj Sujhe estis tre malgranda, ofte okazis inundo kaj akvostagno. Nun la superflua akvo en la basenoj de Tuohe kaj Sujhe trovas sian elirejon en la nova kanalo kaj dragita Tuohe, tiel ke reduktiĝas la enflua kvanto de akvo en la riveron Huajhe. Kaj tiel estas forigita la minaco de inundo kaj akvostagno al 14 gubernioj kaj urboj kun miliono da hektaroj da kampoj de Henan, Anhuj kaj Giangsu en nordo de Huajhe. En la baseno de Tuohe, oni jam profitis el la plivastigo de Tuohe dum ĝia efektiviĝo. Lastjare, malgraŭ la tre alta akvonivelo, la rivero ne inundis la bordojn. La produktokvanto de greno superis tiun de ordinaraj jaroj je 20-30%. Tiu plivastigita kaj pliprofundigita rivero estas utiligata ankaŭ por irigacio kaj navigacio. Tio stimulos la industrian kaj agrikulturan produkton kaj rapidigos la ŝanĝon de la fizionomio de Huajbej-ebenejo.

Ĉar la regantoj de la malnova Ĉinio nenion faris por jungi akvegon, Huajbej-ebenejo estis ofte atakata de katastrofo de inundo antaŭ la Liberiĝo. Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, kiam la japanaj imperiistoj invadis Henan, la banditaj trupoj de Ĉiang Kajŝek disfale retiriĝis en paniko kaj detruis, por savi sin, la digon sur la suda bordo de la Flava Rivero laŭ ordono de Ĉiang Kajŝek, tute spitante la damaĝon al la vivo kaj havaĵo de la popolo. Kaj la fluo de la Flava Rivero portis kun si grandan kvanton da loeso kaj sablo al Huajhe kaj Tuohe, tiel ke al Huajbej-ebenejo okazis granda katastrofo pro granda pluvo, malgranda katastrofo pro malpli granda pluvo, kaj sekeco pro manko de pluvo.

Nia granda gvidanto Prezidanto Maŭ tre zorgas pri la batalo fare de la tiea popolo kontraŭ la malutiloj de Huajhe. Frue jam en la jaro 1951, li faris la alvokon **"Nepre jungu Huajhe"** kaj difinis la principojn kaj politikojn por deradike jungi la riveron. Sekvante la grandan instruon de Prezidanto Maŭ, la popolo sur Huajbej-ebenejo komencis ardan amasmovadon por jungi Huajhe, aplikante la principon de samtempa atento pri irigacio kaj defluigo kaj rikoltis tre grandan sukceson. Sed por subfosi tion, la renegato, interna spiono kaj laborist-perfidulo Liu Ŝaŭki kaj liaj agentoj en la loko plenenergie predikis kontraŭrevolucian reviziisman linion en jungado de la rivero. Ili blinde emfazis konservon de akvo sen necesa rimedo pri defluigo de superflua akvo. La lokaj popolanoj kaj revoluciaj kadroj faris firman batalon kontraŭ la kontraŭrevolucia reviziisma linio de Liu Ŝaŭki. Ripetade studante la brilajn verkojn de Prezidanto Maŭ *Pri Kontraŭdiro* kaj *Pri Praktiko*, ili profunde faris esploradon kaj enketadon, fine trovis rimedon por forigi katastrofojn de inundo kaj akvostagno, kaj ellaboris la projekton de fosado de Hinbianhe kaj plivastigo de Tuohe.

En novembro de 1966, centmiloj da popolanoj el Huajbej venis al la laborejoj por komenci la efektivigadon de tiu granda projekto.

La projekto ampleksis pli ol dudek konstruobjektojn grandajn kaj mezgrandajn, inkluzive subterajn kanalojn, akvobarilojn, pumpstaciojn kaj ŝoseajn pontojn. Iuj burĝaraj teknikaj "aŭtoritatuloj" intencis ŝanceli la memfidon de la amasoj, dirante: "Vi povas mem efektivigi malgrandajn konstruobjektojn, kia fosado de iaj kanaletoj. Sed tian grandan konstruprojekton vi ne povas realigi sen helpo de specialistoj kaj inĝenieroj." Pri tio la laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj respondis fiere: "Kun ruĝa koro fidela al Prezidanto Maŭ ni povas plenumi tion, kion eĉ ne kuraĝas pensi 'specialistoj' kaj 'aŭtoritatuloj' edukitaj en fremdaj landoj."

Ili laboris kaj samtempe lernis dum laborado. Kiam oni faris ŝvelan kaŭĉukan akvobarilon de progresinta nivelo por Linghi-akvobarilo, la laboristoj, malriĉkamparanoj, malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj teknikistoj trovis novan metodon post ripetada eksperimento. Provado montris ke la nova metodo estas pli efika. Dank' al ĝia aplikiĝo la barilo ne facile tralasas akvon kaj granda kvanto da nerusta ŝtalo estis ŝparita.

La centmiloj da konstruantoj, kiuj kun alta batalspirito sin dediĉis al tiuj konstruobjektoj, kompakte kombinante la revolucion kun la konstrua laboro. Sub la helpo de ĈPLA-anoj, la laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj levis ardan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. Sur la konstruejoj kun totala longeco de 250 kilometroj, pli ol tricent mil laboristoj faris revolucian amasan kritikadon, kritikante buŝe kaj skribe la kontraŭrevoluciajn reviziismajn nigrajn varojn kolportitajn de Liu Ŝaŭki kiaj "materia stimulo" kaj "mono en komando".

Dank' al la revolucia amasa kritikado leviĝis ilia konscio pri klasbatalo kaj batalo inter la du linioj. Ili laboris kun la spirito timi nek malfacilojn nek morton kaj multaj kreis heroaĵojn. La plej malfacila tasko de fosado de la kanalo troviĝis

en Suhian de Anhuj. Tie parto de la kanalo kun profundeco de 20 metroj kaj larĝeco de 230 metroj devis trapasi rokan monton en longeco de kvar kilometroj. La laboristoj, malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj ĉiam batalis senĉese tiel en varmega somero kiel en frosta vintro, kiam la tero fariĝis tiel malmola kiel roko.


Foje, malriĉkamparano Ŝi Ĉanghia puŝis ĉaron da tero sur monton. Subite rompiĝis la kablo de pulio, per kiu oni tiris la ĉaron. La ĉaro komencis gliti malsupren, kaj serioza akcidento evidente tuj okazos. Tiumomente la instruo de Prezidanto Maŭ **"Ni mortas indan morton, se ni mortas por la popolo"** venis al Ŝi Ĉanghia en la kapon. Per la tuta forto li tuj ĵetis sin kontraŭ la malsupren glitanta ĉaro por protekti la klasfratojn laborantajn ĉe la montpiedo. Tamen la ĉaro ne estis haltigita. Ĝi glitis ankoraŭ certan distancon kaj falis sur lian korpon. Li vundiĝis kaj svenis. Kiam li rekonsciiĝis post urĝa helpo, la unua frazo, kiun li diris, estis: "Ĉu kamaradoj estis vunditaj?" Lia koro malŝarĝiĝis, kiam li informiĝis ke ĉiuj estas sekuraj.

En la lasta jaro, kiam venis la ĝojiga novaĵo pri la venka kunvoko de la Naŭa Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio, la kvarcent kvindek mil popolanoj el la tri provincoj ĝuste tagnokte batalis por la projekto. La granda alvoko farita de Prezidanto Maŭ en la kongreso **"Unuiĝu por akiri ankoraŭ pli grandajn venkojn"** puŝis ilian decidemon por unuiĝi kaj jungi Huajhe al ankoraŭ pli alta grado.

En printempo de 1969, kiam la laboro eniris la decidan etapon, okazis en la loko malofte renkontita akvego. Ĝi fluegis de la altejo de la baseno de Tuohe ampleksanta du mil kvadratajn kilometrojn malsupren al la konstruejo en Henan. Tio formis seriozan minacon al la cent kvindek mil popolanoj tie laborantaj. Por ke la akvego ne malhelpu la regulan iradon de la konstrua laboro de la tricent mil klasaj fratoj laborantaj malsupre en Anhuj, ili decidis konstrui baraĵon por reteni la akvegon en sia laborloko. Pro la profundeco kaj rapideco de la akvofluo oni devis subakviĝi kelkfoje por enbati unu foston. La digo estis starigita nur post peniga klopodado en du tagnoktoj.

Nun, la komunumanoj fosas branĉajn kanaletojn laŭ la nova kanalo kaj dragita Tuohe, por vaste formi irigacian reton kaj akiri per sia penado pli grandajn riĉrikoltojn.

*Akvobarilo de Hinbianhe de Suhian en konstruado*



# VORTOJ DE PREZIDANTO MAŬ ZEDONG

**(En Esperanto)**

*358 p., en poŝformato kun ruĝa plasta kovrilo*

**Eldonis: Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio**
**Distribuas: Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo,**
**P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

# Komuniko de la Dua Plena Sesio de la Naŭa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio

La 6-an de septembro, 1970

**(En Esperanto)**

12.8 x 9 cm. en broŝuro

**Eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Pekino, Ĉinio**
**Distribuas la Libroservo de la Ĉina Esperanto-Ligo**
**P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio**

JAGI JUTAKA:

# Pli ol Tridek Jarojn en Ĉinio

Jagi Jutaka estas japana specialisto, kiu multjare laboris en nia lando. Li reiris al Japanio en januaro de la kuranta jaro. Post reveno al sia patrio, li publikigis en la trimestra gazeto *Asahi Azia Revuo* artikolon pri sia vivimpreso en Ĉinio. Legu ĉisube mallongigitan tradukon de tiu artikolo.

*La Red.*

ESTIS la 21-a de januaro de la kuranta jaro, kiam mi suriris japanan ŝipon ĉe Hingang de Tiangin kaj forlasis Ĉinion, en kiu mi loĝadis pli ol tridek jarojn, por reveni al Japanio. Je la 8-a de februaro, kun larmoj en la okuloj, rigardante la patrolandon en pluveto mi surbordiĝis ĉe Fukujama.

## JUNA BATALANTO DE LA OKAVOJA ARMEO

Japanio kapitulacis je la 15-a de aŭgusto de 1945. Tiam mi loĝis en la t. n. "Nova Ĉefurbo" Ĉangĉun kaj laboris en la Manĉuaj Kinematografia Asocio.

En printempo de la sekvinta jaro 1946, jam komenciĝis la milito inter la Okavoja Armeo (kies trupo en nordorienta Ĉinio estis nomata Nordorienta Demokratia Unuigita Armeo) kaj la reakcia armeo de Kuomintango. Tiam la fronta komandejo de la Nordorienta Demokratia Unuigita Armeo estis lokita en la supera etaĝo de mia hejmo. Nombro da gardistoj de la komandantoj loĝis en mia hejmo. Ili ĉiuj estis junaj batalantoj 15-16-jaraj, sed estis tre afablaj, serenkoraj kaj facile kontakteblaj. Kvankam tiel estis, mi tamen tre timis ilin pro mia kulpa konscienco. Kvankam senkonscie, mi tamen ja servis al la agreso de la japana imperiismo kontraŭ Ĉinio en kultura laboro. Sed miaj timoj baldaŭ estis eliminitaj de la serena spirito de la junaj batalantoj. Mi havis relative multajn interparolojn kun unu el ili. Li portis pistolon ornamitan per ruĝa rubando kaj kartoĉzonon plenan de kartoĉoj. Kiam mi menciis, rakontante pri miaj travivaĵoj, ke mi perdis miajn gepatrojn en la aĝo de tiu juna batalanto, la temo de nia interparolo turniĝis al la familia historio de la juna batalanto. Tiam subite peziĝis lia koro.

La hejmloko de tiu knabo estis vilaĝo de Ŝandong-provinco. Kvankam malriĉa estis lia familio, tamen ĝi ĝuis pacan laboran vivon. Iutage, subite venis japana trupo. Liaj gepatroj kaj fratoj estis mortigitaj post kruela torturado kaj postrestis nur la knabo. Por venĝi sin, li aliĝis al la Okavoja Armeo kaj prenis pafilon. Ĉiam pli forte li ekscitiĝis kaj indigniĝis. Mi paliĝis kaj povis fari nenion ol mute klini la kapon. Tiam la parolo de la knabo elokventiĝis. Li diris, ke post lia aliĝo al la Okavoja Armeo, lia malamo kontraŭ la simplaj japanaj popolanoj turniĝis al la japana imperiismo. Li komprenis, ke inter la japanoj troviĝas imperiistoj, kiuj agresas aliajn landojn kaj subpremas la popolon de sia lando, kaj ankaŭ popolanoj subpremataj. Kiuj mortigis liajn gepatrojn kaj agresas Ĉinion, estas japanaj imperiistoj kiuj subpremas ankaŭ la japanan popolon.

"Ni iru manon en mano kaj kune venĝu nin kontraŭ ili pro la sanga ŝuldo, nun mi ne rigardos vin kiel malamikojn. Vi pruntedonis al ni domon, ni dankas vin. Vi estas niaj amikoj." Frapetante la pistolon kun ruĝa rubando li diris: "Per tio ĉi ni faligu imperiismon kaj la reakciulojn. Ili estas niaj komunaj malamikoj." Pretervole ni firme manpremis unu kun la alia. Tiam mi larmis senĉese. Tian senton mi neniam havis antaŭe.

Post longa vivado en Ĉinio mi profunde komprenas, ke la ĉina popolo strikte distingas la imperiistojn kaj reakciulojn dis de la popolo. En sia nuna severa riproĉo pri la imperiismiĝo de Japanio la ĉina popolo firme persistas ankaŭ ĉe tiu sinteno.

## LA ANTAŬVIDO DE PREZIDANTO MAŬ

Nelonge post kiam la Nordorienta Demokratia Unuigita Armeo liberigis Ĉangĉun, ĝi facile ĝin forlasis kaj retiriĝis norden de Songhua-rivero.

Ankaŭ ni, parto de la japanoj, venis al Hegang en la norda parto de la Nordoriento kune kun la filmfarejo transprenita de la ĉina flanko. Tiam mi estis maltrankvila pro la estonto de la situacio de la milito. Ĉar mi vidis, ke la reakcia armeo de Kuomintango havas Usonon kun atombomboj kiel apogilon kaj estas armita per usonaj aviadiloj kaj tankoj, dum la Nordorienta Demokratia Unuigita Armeo havas nur fusilojn plus tre malmulte da kanonoj kaj estas devigita retiriĝi al la norda parto.

Baldaŭ poste en decembro de 1947, Prezidanto Maŭ publikigis sian raporton *La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj*. Ĝi emfazis, ke la revolucia milito de la ĉina popolo jam atingis turnopunkton; tio estas turnopunkto kun historia signifo por la baldaŭa pereo de la dudekjara kontraŭrevolucia regado de Ĉiang Kajŝek kaj la pli ol centjara regado de imperiismo en Ĉinio. Tiam mi estis tre surprizita de tiu kuraĝa aserto. Kompreneble mi sciis, ke la artikolo *Pri Longdaŭra Milito* publikigita de Prezidanto Maŭ en majo de 1938 tre science antaŭdiris la estonton de la Kontraŭjapana Rezistmilito. La evento disvolviĝis ĝuste tiel, kiel antaŭdiris Prezidanto Maŭ. Tion mi admiris. Sed ĉar mi ne vivis rekte en tiu medio, mi ne havis fortan impreson en praktiko.

La granda historia turnopunkto montrita en la verko de Prezidanto Maŭ *La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj*, kiun mi duonkrede kaj duondube legis, aperis antaŭ miaj okuloj kiel turnosceno malpli ol du jarojn poste. Antaŭ miaj okuloj aperis serio da historiaj eventoj, kiaj la Liaŭhi-Ŝenjang-a Kampanjo finiĝinta per la liberigo de Ŝenjang je la 2-a de novembro, 1948, la Bejping-Tiangin-a Kampanjo en januaro de 1949, la liberigo de Nankino je la 23-a de aprilo, la liberigo de Ŝanhajo je la 27-a de majo kaj la baldaŭa liberigo de la tuta ĉeftero de Ĉinio en la sama jaro kaj la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko je la 1-a de oktobro, 1949. Kun la progreso de la historio, mi transiris de la plej norda kamparo al Harbin, Ŝenjang, Pekino. De post kiam mi venis al Pekino en oktobro de 1949 ĝis mia reveno al la patrio en januaro de la kuranta jaro, mi loĝadis sole en Pekino pli ol dudek jarojn.

Antaŭ la historiaj eventoj elvolviĝantaj antaŭ miaj okuloj, mi tute konvinkiĝis pri la grandaj sciencaj antaŭdiroj de Prezidanto Maŭ. Tiam mi pensis: mi nepre konos, eĉ se nur iomete, Maŭzedongpenson, kiu formis tian sciencan antaŭdiron. La plej ĉefa motivo por mia restado en Ĉinio kuŝis en tio, kaj kompreneble estis aliaj kialoj.

Multaj historiaj eventoj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko denove pruvis la grandecon de la sciencaj antaŭvidoj de Prezidanto Maŭ. Ekzemple, Prezidanto Maŭ antaŭvidis la danĝeron de la degenero de Sovetunio de socialismo al moderna reviziismo kaj social-imperiismo kaj faris plurajn avertojn pri tio. La teoria bazo de tiu vidpunkto estas la artikolo *Pri la Ĝusta Traktado de Kontraŭdiroj Interne de la Popolo* de Prezidanto Maŭ publikigita en 1957. La artikolo emfazas, ke en socialisma socio ekzistas klasoj, klasaj kontraŭdiroj kaj klasbatalo, kaj ĝi emfazas la neceson de daŭra revoluciado, firmigo de la proletara diktaturo kaj plifortigo de la proletara partio. La Granda Proletara Kultura Revolucio ĝuste praktikis tiun teorion kaj faligis la kontraŭrevolucian klikon de Liu Ŝaŭki.

En Japanio plena de mensogoj kaj kalumnioj, iuj eble ne povas tuj kompreni la grandan historian signifon de la granda kultura revolucio, sed mi konvinkiĝis el mia persona sperto en Ĉinio, ke kun paso de tempo la granda kultura revolucio disradios pli kaj pli fortajn brilojn per siaj gigantaj fruktoj.

## LA VIVNIVELO EN ĈINIO

"Kia estas la vivnivelo tie?"

Post mia reveno al Japanio, nemalmultaj turnis sin al mi kun tiu demando.

Komparante la vivon antaŭ kaj post la Liberiĝo, ĉinoj kutime diras: "paradizo kaj infero en kontrasto", tio signifas grandegan diferencon. Ja estas vere, ke nun Ĉinio estas la unika lando en la mondo kiu ne havas ŝuldon en- aŭ ekster-landan. La vivnivelo de la tuta popolo altiĝas kun ĉiu tago. La vivbezonaĵoj estas tre malkaraj, la prezoj stabilaj kaj la vivrimedoj garantiataj. Reveninte al Japanio, mi vidis ke la prezoj de legomoj multe altiĝis pro ia Universala Ekspozicio; por hartondigo, en Japanio oni devas pagi 500 jenojn, dum en Ĉinio oni bezonas nur 50-60 jenojn. Komparo de tiaj faktoj profunde sentigas al mi la feliĉon en ĝuo de stabilaj prezoj.

## MANĜO POR MEMORIGO PRI LA PASINTAJ SUFEROJ

En la lastaj jaroj, en Ĉinio formiĝis moro, ke oni difinas iun daton por kune preni manĝon por memorigo pri la pasintaj suferoj, t.e. la suferoj antaŭ la Liberiĝo. Foje mi petis por preni tian

manĝon. Ĝi estis farita el kuirita brano kaj malfacile glutebla. Aldone al tio estis peco da tre saligita rafano. Oni diris, ke tio estas multe pli bona ol la manĝo antaŭ la Liberiĝo. Ili prenas tian manĝon ne pro tio, ke mankas al ili rizaĵo. Ili tion faras de tempo al tempo por memorigi la suferojn antaŭ la Liberiĝo kaj konscii la feliĉon hodiaŭan, kaj krome pensi pri tio, ke en la mondo ankoraŭ estas multaj neliberigitaj homoj subpremataj.

Antaŭ la Granda Proletara Kultura Revolucio, ankaŭ en Ĉinio estis parto da homoj kiuj ĉasis materian ĝuon. Iuj homoj ne volis porti kotonajn vestojn sed aĉetis por si altklasajn lanŝtofojn, interesiĝis pri luksaj mebloj kaj sofoj kaj sindonis al distroj. Tio similas al la moro de la japanaj "familietoj". Liu Ŝaŭki kaj liaj kunuloj agitis ĝuste por iro de tiu vojo. Tiamaniere, parto da homoj komencis korodiĝi de burĝara ideologio kaj forgesis la revolucion. Ankaŭ troviĝas homoj, kiuj ne volis resti en la kamparo sed deziregis iri en urbojn. La Granda Proletara Kultura Revolucio faligis Liu Ŝaŭki kaj liajn kunulojn, kiuj estis la ĉefaj krimuloj en formado de tiu tendenco, kaj vekis la plejparton de la venenitoj. En la cerbo de la ĉinoj, revolucio okupas la unuan lokon. La tradicia stilo de la Popola Liberiga Armeo, nome senlukseco kaj penema luktado en malfaciloj, denove enradikiĝas en la kapoj de la homoj. Nun vaste disvastiĝas la spirito "peni antaŭ la aliaj, ĝui post la aliaj". Se oni ne vidas tiun gigantan ŝanĝiĝon de la ĉina popolo en spirito, oni ne povas ĝuste kompreni Ĉinion.

### DECIDO PRI REVENO AL LA PATROLANDO

Mia decido pri reveno al la patrolando estis farita ne sen sentimentaj kaŭzoj. Ekzemple maljuniĝo, hejmsopiro, plenkreskiĝo de la infanoj ktp. Sed krome ankaŭ estis alia kialo, nome tie mi estis fremdulo kaj pro tio ricevis eksterordinare bonan traktadon. En la granda kultura revolucio, la ŝanĝo de la spirita fizionomio de la ĉina popolo ankaŭ influis min. Mi serioze pensis pri la influo de la eksterordinare bona traktado al mi kaj la sekvaĵo de mia disiĝo de la amasoj.

En sezono de tritika rikolto, mi aktive petis partopreni fizikan laboron de rikoltado en popola komunumo. Sed ankaŭ tie mi ricevis apartan traktadon pro tio ke mi estas fremdulo. La ĉinaj amikoj tiel faris tute pro bonvolo internaciisma. Sed mi sentis timon, trovante ke mi vivas komforte dank' al tiu bonvolo.

Reveninta de Ĉinio mi jam estas homo kun neĝblankaj haroj ĉe la tempioj, sed mi esperas, ke mi rejuniĝos por multon fari.




### KANALO POR FORKONDUKO DE INUNDAKVO EN HINGIANG

Antaŭ nelonge venke finkonstruiĝis la Kanalo por Forkonduko de Inundakvo en la Orienta Bordo de Jeerkiang-rivero, kiu estas la plej granda kanalo en Hingiang kies lito estas fortikigita kaj akvo nepenetrebla.

Jeerkiang-rivero estas branĉo de Tarim-rivero, la plej granda enlanda rivero de nia lando. Ĝia baseno kun fekunda grundo estas unu el la ĉefaj produktejoj de greno kaj kotono en Hingiang. La finkonstruo de la kanalo ebligas irigacion de pli ol 2,300,000 muoj da agroj kaj havas gravan signifon por pliapaŝa disvolvo de la produktado de greno kaj kotono en la baseno de Jeerkiang-rivero kaj efektivigo de la granda strategia dispozicio de Prezidanto Maŭ **"sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo"**.

La kanalo troviĝas en la okcidenta parto de la granda dezerto Taklamagan. Ĝi longas 29.6 kilometrojn kaj trafluas regionon de dezerto kaj marĉoj. Por preventi detruon de la rapida torento al la fluejo kaj tralason de akvo, la tuta kanalo estas masonita el betonaj tabuloj kaj gruzoj, kaj krome al ĝi konstruiĝis 23 ferbetonaj konstruoj kiaj akvofalejo, akvedukto, ponto kaj kluzo por disfluigo de akvo. La terkulturebligaj batalantoj de iu trupo de la Produkta kaj Konstrua Korpuso de la Hingiang-a Milita Regiono kaj malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de diversaj naciecoj prenis sur sin la konstruan taskon de la kanalo.

# Revoluciaj Amikoj Vizitas Ginggang-montaron kaj Jan-an

EN la lastaj jaroj ĉiam pli multaj revoluciaj amikoj el diversaj landoj de Azio, Afriko kaj Latinameriko faris vizitojn al Ginggang-montaro kaj Jan-an — revoluciaj sanktejoj de nia lando. Ili varme laŭdis la brilajn pensojn de Prezidanto Maŭ **"el la pafilo venas ŝtatpotenco"**, starigo de bazlokoj en la kamparo k. a.

### "KIAM ONI PERSISTAS EN ARMITA BATALO, LA REVOLUCIO DISVOLVIĜAS KAJ VENKAS"

Post la veno al Ginggang-montaro kovrita de verdaj pinoj kaj bambuoj, nombro da revoluciaj amikoj el landoj de sudorienta Azio iris laŭ la montvojo, kiun iris siatempe Prezidanto Maŭ, por fari enketojn kaj vizitojn sur Ginggang-montaro, kaj lernis la brilajn pensojn kaj grandajn revoluciajn praktikojn de Prezidanto Maŭ pri la partia gvido, armita batalo, mobilizo de amasoj, starigo de revoluciaj bazlokoj k. a. en la periodo de la batalo en Ginggang-montaro, kaj ili estis multe inspiritaj kaj kuraĝigitaj. Ili diris: En nia nuna vizito, ni multe rikoltis. Pere de la lernado de la historio pri la revolucia praktiko de Prezidanto Maŭ, ni akiris perceptajn konojn kaj tiel plie profundigis nian komprenon pri Maŭzedongpenso.

Kiam grupo da amikoj el palestinaj sturmtaĉmentoj "Al-Assifa" aŭskultis la rakontadon de ĉinaj kamaradoj pri kortuŝaj heroaĵoj en la batalo por defendi Huangjanggie de Ginggang-montaro, multaj el ili diris kun ekscitiĝo: "Brave! Brave!" Tuj sekve, ankaŭ palestinaj amikoj rakontis al la ĉinaj amikoj, kiel la palestina popolo batalas kontraŭ la usonaj kaj izraelaj agresantoj, aplikante la penson de Prezidanto Maŭ pri popola milito. Ili krome donacis militflagon kaj insignojn de "Al-Assifa" al partoprenintoj de la batalo por defendi Huangjanggie, nun membroj de la Revolucia Komitato de Ginggang-montaro. Ankaŭ la nomita revolucia komitato donacis al ili bambuajn najlojn, reproduktitajn laŭ tiuj uzitaj siatempe en la defenda batalo. Akceptinte la bambuajn najlojn iu palestina amiko diris kun ekscitiĝo: "Ni estas revoluciuloj en la sama tranĉeo kaj batalas kontraŭ la komuna malamiko. Nur se ni palestina popolo bone studas kaj aplikas Maŭzedongpenson, nia revolucio certe akiros la finan venkon."

Venkinte malfacilojn post malfaciloj revolucia amiko el iu lando de sudorienta Azio venis al la revolucia sanktejo Jan-an. Li diris post la vizito: "La granda vero de Prezidanto Maŭ **'el la pafilo venas ŝtatpotenco'** estas pruvita jam de la revolucia praktiko de nia lando. Ĝi estas la sole ĝusta vojo." Rakontinte pri la disvolvado de la armita batalo en sia lando li diris: "La praktiko komprenigis al ni: Kiam oni forlasas la armitan batalon, la revolucio suferas repuŝon kaj malvenkon; kiam oni persistas en armita batalo, la revolucio disvolviĝas kaj venkas. Tio ĉi estas granda vero nerompebla."

### NECESAS FONDI KAJ DISVOLVI REVOLUCIAJN BAZLOKOJN

Riskante sian vivon, pli ol dudek revoluciaj amikoj el iu azia lando trarompis blokadojn de la reakciularo kaj fine venis al Ĉinio, al la longe sopirata Ginggang-montaro.

En la Glora Domo por Aĝuloj en Ciping, la revoluciaj amikoj vizitis tieajn revoluciajn maljunulojn kaj informiĝis pri la procedo, kiel la Ruĝa Armeo mobilizis la popolon al batalo kontraŭ la lokaj tiranoj por dividi iliajn bienojn. Ili detale demandis pri ĉiu apartaĵo kaj ĉiu politiko en la disvolvado de la agrara revolucio. Tage ili faris vizitojn kaj enketojn kaj nokte diskutojn kaj studojn. Kiam

ili estis forlasontaj Ginggang-montaron, iu kamarado el ili diris al la revoluciaj maljunuloj: "Dankojn pro viaj rakontoj. Ni profunde konvinkiĝis, ke la torĉo de agrara revolucio en Ginggang-montaro baldaŭ bruligos la tutan teron de nia lando. Tiam, nia revolucio vekos la amasojn milione nombrantajn, kaj niaj bazlokoj fariĝos feraj bastionoj, nefrakaseblaj!"

Kiam iu afrika amiko vidis, en la arsenalo de la Kvara Ruĝa Armeo en Ciping, simplajn armilojn per kiuj la Ruĝa Armeo starigis ruĝan bazlokon en batalo, li tre emociiĝis kaj diris: "La venko de la ĉina revolucio estis akirita dank' al pafiloj. Ni afrikaj popoloj povos akiri ĝisfundan liberiĝon, ankaŭ nur se ni prenas pafilojn kaj iras la vojon de armita batalo. **'El la pafilo venas ŝtatpotenco'** estas brila revolucia vojo montrita de Prezidanto Maŭ por la ĉina popolo kaj la popoloj de la mondo." Farante viziton en Jan-an, alia afrika amiko longe fiksis sian rigardon sur la fusilo kaj saketo da milio elmontritaj en la ekspozicia halo kaj diris kun senkompare profunda sento: "Nur se ni iras la vojon montritan de Prezidanto Maŭ kaj fondas revoluciajn bazlokojn por armita batalo, ni certe povos venki la reakciularon kaj akiri venkon de la revolucia batalo dank' al fusilo plus milio. La granda venko de la ĉina revolucio estas granda kuraĝigo al la revolucia batalo de la popoloj de Azio, Afriko kaj Latinameriko."

### "FIRME TENI LA PAFILON"

Iu latinamerika amiko dufoje venis al Ĉinio, venkinte multajn malfacilojn kaj danĝerojn. Kiam li kaj liaj kunbatalantoj la duan fojon vizitis Ĉinion, ili venis al Ginggang-montaro. Ĉu en ventpluvaj tagoj aŭ sub arda suno, ili ĉiam direktis sin al gvatejoj sur altaj montoj kaj zigzagaj, malebenaj vojoj, kie antaŭe aktivadis la Ruĝa Armeo. En la vilaĝo Daging, ili aŭskultis rakontojn de maljunuloj pri revoluciaj aktivadoj de Prezidanto Maŭ, kiu siatempe profundiĝis inter la amasojn por fari enketojn kaj esplorojn. Kaj en la iama loĝejo de Prezidanto Maŭ kaj la Okangula Pavilono en Ciping, ili lernis kaj pridiskutis la brilajn verkojn *La Batalo en Ginggang-montaro* kaj *Kial Ruĝa Politika Potenco en Ĉinio Povas Ekzisti?* skribitajn tie siatempe de Prezidanto Maŭ. Iu amiko diris: "Ni devas superi ĉiujn malfacilojn, starigi en nia lando bazlokon laŭ la tipo de Ginggang-montaro kaj konduki la revolucion ĝis la fino same kiel la tiamaj popolanoj de Ginggang-montaro."

Iun antaŭtagmezon, dum vizito al la vilaĝo Daging fremdlandaj amikoj trovis la maljunan siatempan estron de ribela taĉmento. Laŭ ilia peto la maljunulo rakontis ekzemplajn historiojn pri tio, kiel Prezidanto Maŭ aplikis, en la periodo de la batalo en Ginggang-montaro, la strategion kaj taktikojn: **"Vi batalas laŭ via maniero kaj ni laŭ la nia; ni batalas kiam ni povas venki kaj foriras kiam ni ne povas."** Poste li persone prezentis la bajonetan luktarton por montri kiel la ruĝaj armeanoj kaj popolanoj de Ginggang-montaro batalis kontraŭ la reakciuloj. "Brave, brave!" la fremdlandaj amikoj varme manklakis kaj laŭdis la maljunulon pro liaj viglaj movoj. Iu fremdlanda amiko transprenis de liaj manoj la fusilon, kaj faris per ĝi pikadon laŭ la sama maniero, kriegante: "Faligi imperiismon, reviziismon kaj reakciularon!" Alia firme premis la manon al la maljunulo kaj diris emocie: "Dankon al vi. Ni certe tenos firme la pafilon, ĝuste aplikos la strategion kaj taktikojn de Prezidanto Maŭ pri popola milito, decideme frakasos la ĉirkaŭekstermojn de la reakciularo kaj batalakiros ruĝan novan ŝtatpotencon per la pafilo!"

---

## Korespondi Deziras

**ĈEĤOSLOVAKIO**
Dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj revoluciaj geesperantistoj, geologostudento Stanislav Tuma, Prago — 4 Horni 10.

**FRANCIO**
Dez. kor. kaj interŝanĝas. p. k. kaj p. m. kun geesperantistoj de Ĉinio, la Vjetnama Demokratia Respubliko kaj la Demokratia Popola Respubliko de Koreio, s-ro Leduc Paul, 35 Av. ND du Lac Anfers-49.

**JAPANIO**
Dez. kor. kun alilandaj geesperantistoj pri infanliteraturo, 38-jara infanliteraturisto Kitamura Ĵunji, 75, Shikimidai, Asahi-ku, Yokohamashi.

**HUNGARIO**
Dez kor. kaj interŝ. p. m., Plata Gyula, Cegled. Wengrie.

**HISPANIO**
Dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj, Alfonso Pernandes Robles, Villa Dominica N-ro 2-4 izda, Fifaredo Asturias.

**KANADO**
Dez. kor. 73-jara inĝenieroagronomo Dmytro Sawkewycz, P. O. Box 128, Grimsbyontario.

**NEDERLANDO**
Dez. kor. s-ino C. Takens-Bakker, Ds Sannesstraat 34, Veendam.

# Kanto de Amikeco

ANTAŬNELONGE, pro malatento, la dekstra mano de la vjetnama lernanto-praktikanto Nguyen Thi Vi, kiu lernis la metion de frezisto en la Fabriko de Ŝpinaj kaj Teksaj Maŝinoj de Ĝengĝoŭ, Henan-provinco, estis detranĉita de frezilo. Post la malfeliĉa akcidento, koncernaj institucioj kaj revoluciaj kuracaj laborantoj disvolvis sian proletaran internaciisman spiriton, aktive savis ŝin kaj sukcesis replanti al ŝi la detranĉitan manon. Per tio estas komponita kanto de batala amikeco inter la ĉina kaj vjetnama popoloj.

La akcidento okazis je 40 m. post la 2-a horo matene en la 5-a de aprilo. Tiam aliaj laboristoj de la fabriko samtempe deĵorantaj vidis tion kaj tuj portis ŝin surdorse al la sanprotektejo de la

*Ostologia kuracisto Ĉen Ĝongvej (la tria de dekstre) ekzamenas la funkcion de la resaniĝanta dekstra mano de Nguyen Thi Vi.*



fabriko por fari unuan helpon per bandaĝo, kaj poste ŝi estis portita al la hospitalo dependa de la Henana Medicina Kolegio.

Informiĝinte pri la kazo, la kuracistoj de la interna medicino, kirurgio kaj ostologio de la hospitalo kaj la kirurgoj de armea hospitalo en la ĉirkaŭaĵo venis al la kirurgia ĉambro de la hospitalo por kune interkonsiliĝi. Ili aplikis rimedon por plilongigi la konservan periodon de la detranĉita mano kaj post tio tuj sendis la pacientinon per speciala aeroplano al la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo por fari operacion.

Kiam la aeroplano estis sur la vojo, la Sesa Popola Hospitalo de Ŝanhajo jam ricevis instrukcion de la urba revolucia komitato: Tuj faru ĉian necesan preparon kaj klopodu ĉiamaniere por replanti la manon al la vjetnama fratino!

La respondecaj kamaradoj de la laborista kaj ĈPLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso kaj la revolucia komitato de la hospitalo ĉiuj rapidis al la operacia ĉambro por komandi la batalon. La kuracistoj kaj flegistinoj de la ostologia fako kaj la laborantoj de la kliniko por urĝaj kazoj, radioskopia ĉambro, operacia ĉambro, laboratorio kaj sangokonservejo ĉiuj sin pretigis por ago en mallonga tempo. Ankaŭ Ĉen Ĝongvej, la kuracisto kiu sukcese faris operacion de replanto de detranĉita mano kaj estis en forpermeso hejme, venis al la hospitalo por partopreni la urĝan savlaboron.




*Anoj de la laborista kaj ĈPLA-a propaganda taĉmento de Maŭzedongpenso kaj kuracaj laborantoj en la hospitalo tre zorgas pri la sanstato de Nguyen Thi Vi (la dua de maldekstre) kaj ofte iras en la malsanulan ĉambron por ŝin vidi.*

Kiam Nguyen Thi Vi estis portita al la nomita hospitalo, la kuracaj laborantoj tuj sin ĵetis en intensan laboron. La tranĉo estis farita ĝuste ĉe la dekstra pojna artiko de la pacientino. La mano disiĝis de la brako jam pli ol 6 horojn. Laŭ eksterlanda medicina literaturo, post ĉeso de sangocirkulado dum pli ol 6 horoj detranĉita membro ne estas plu revivigebla per replanto. Sed, la mano apartenas al vjetnama kunbatalantino, kiu staras sur la plejfronto kontraŭ imperiismo, sukcese replanti ĝin, por ke ŝi bone partoprenu la batalon kontraŭ la usonaj agresantoj kaj konstruu sian patrujon, estas nia efika subteno al la frata vjetnama popolo en ĝia nacisava batalo kontraŭ la usona agreso. La kuracaj laborantoj faris firman decidon nepre replanti la manon viva al Nguyen Thi Vi.

Post atentema ekzameno kaj zorga interkonsiliĝo, Ĉen Ĝongvej kaj aliaj kuracistoj difinis operacian projekton.

Post transfuzo komenciĝis la operacio. Kunfiksitaj estis la ostoj kaj kunigitaj la tendenoj. Nun komenciĝis la interkomunikigo de sangangietoj. Tio estis peniga laboro. Kun varma proletara amo al la vjetnama kunbatalantino, la kuracistoj kunkudris la vejnojn kaj arteriojn kudrero post kudrero per kudrilo pli maldika ol haro kaj fadeno tiel maldika kiel silko.

Estis kunkudrita la radiusa arterio. Kiam la kuracisto forprenis la prempinĉilon de la angio, sango denove cirkulis en la arterio, kaj la pala kaj malvarma mano ree montriĝis vivkolora kaj iom post iom varmiĝis. La detranĉita mano estis ree alplantita al la vjetnama fratino.

La tuta operacio daŭris 5 horojn kaj 10 minutojn. Post la operacio, la kuracaj laborantoj denove kunvenis malgraŭ la laciĝo por studi kuracan kaj flegan laboron postoperacian. La flegistinoj alterne flegis la vjetnaman fratinon tage kaj nokte en tri deĵoroj dum 16 sinsekvaj tagoj rezignante pri ferioj.

Por veki la apetiton de la pacientino, oni faris ĉion eblan por prepari manĝaĵon laŭ vjetnama maniero konforme al ŝia gusto, por ke ŝi povu rapide reakiri la forton de sano. Aŭdinte ke Nguyen Thi Vi amas freŝan brasikon simple kuiritan, oni elektis kaj kuiris plej junajn foliojn por ŝi.

La vjetnama popolo, kiu havas gloran revolucian bataltradicion, ne cedas antaŭ malamiko. Kontraŭ la serioza vundo kaj doloro, Nguyen Thi Vi plene elmontris la heroan naturon de la vjetnama popolo. Ŝi ofte kantis sur la lito revoluciajn batalkantojn, kiujn la vjetnama popolo kantas sur la batalkampoj por kuraĝigi sin en batalo kontraŭ la vundo kaj doloro. Ia-foje ŝi akuzis indigne la faŝistajn kruelaĵojn de la usonaj agresantoj en Vjetnamio antaŭ flegistinoj kaj malsanuloj aŭ rakontis heroajn militajn historiojn de la vjetnama popolo. Ŝi diris, ke unu el ŝiaj onkloj de patrina flanko estis kruele mortigita de la usonaj rabistoj. Nun la vjetnamaj virinoj ĉiuj donas solidan baton al la usonaj agresantoj. Ili faras bambuajn pikilojn por mortpiki la malamikojn, tiel ke ili troviĝas en granda paniko.

La aŭdintoj estis multe tuŝitaj de la revolucia heroismo de Nguyen Thi Vi. La flegistino decidis nepre bone flegi la vjetnaman fratinon, por ke ŝi kiel eble plej frue reiru al sia batalposteno kun resanigita dekstra mano.

Nguyen Thi Vi estis tre emociita, informiĝinte ke la hospitalo transfuzis por ŝi 1,000 kubcentimetrojn da sango. Ŝi diris: "Nun en miaj arterioj fluas sango de la ĉina popolo! Mi nepre plenforte batos la usonajn agresantojn!" Ŝi kolektis atente la lav- kaj viŝ-tukojn uzitajn de ŝi en la hospitalo, dirante: "Mi portos al Vjetnamio kaj konservos tiujn objektojn por ĉiam ĉe mi kiel memorigaĵon."

Sub la zorga kuracado kaj flegado, jam tute kuniĝis la vundrandoj de la mano de Nguyen Thi Vi du semajnojn post la operacio kaj estis sukcese deprenita la kudrofadeno. La funkcio de la replantita mano iom post iom restariĝis normale kaj la fingroj nun jam povas fari nefortajn movojn.

---

# Inter Ni

### LETERO DE SVEDA LEGANTO H.

La instrukcioj en la tre grava deklaro de Prezidanto Maŭ Zedong *Popoloj de la Tuta Mondo, Unuiĝu kaj Venku la Usonajn Agresantojn kaj Ĉiujn Iliajn Lakeojn* fortigas la batalvolon kontraŭ la imperiistoj kaj iliaj lakeoj. Kaj la sinteno de la soveta registaro ne agnoski la Reĝlandan Registaron de Nacia Unuiĝo de Kamboĝo mirigas multajn svedajn kompartianojn; tial viaj eldonaĵoj havas grandan klerigan signifon por "apartigi la tritikon for de la grenventumaĵoj".

### LETERO DE ĈEĤOSLOVAKA LEGANTO E. D.

Mi treege ĝojas pro la pensoj kaj verkoj de Maŭ Zedong, kiujn vi sendis al mi.

Mi instruas mian filinon kaj edzinon, mi tradukos ĉion kion mi ricevis de vi. Mi kaj ĉiu homo de nia lando bone scias, kiu batalas por nia komuna afero.

Amikoj, mi estas laboristo kaj mia familio estas laborista familio. Ni treege amas la ĉinan popolon.

Foje demandis mia filino: Ĉu la granda homo "Maŭ Zedong" estas tiel granda kiel "Lenin"?

"Jes, mia kara! Lenin estas granda homo, sed la granda instruanto Maŭ Zedong estas pli granda en nia progresa mondo." Tio estas miaj sanktaj vortoj! Kredu al mi!

Estu fortaj ni ĉeĥoslovakaj esperantistoj kaj ĉiuj homoj! Ni estas kun vi!!

“东风号” 到了 温哥华
Dōngfēng-hào Dàole Wēngēhuá
(orienta vento alveni Vancouver)

# La “Orienta Vento” Venis al Vancouver

“东风号” 是 我 国 自行 設計 和 制造 的 万吨級
Dōngfēng-hào shì wǒ guó zìxíng shèjì hé zhìzào de wàndùnjī
(orienta vento esti mi lando mem projekti kaj konstrui -a dekmiltonela klaso
**La “Orienta Vento” estas oceana varŝipo de dekmiltonela klaso, projektita kaj konstruita**

远洋 貨輪。今年 八月，它 到了 加拿大 的 温哥华港。很 多
yuǎnyáng huòlún. Jīnnián bā-yuè, tā dàole Jiānádà de Wēngēhuá-gǎng. Hěn duō
oceana varŝipo ĉi-jare oka monato ĝi alveni Kanado de Vancouver haveno tre multa
**de nia lando mem. En aŭgusto ĉi-jare, ĝi venis al la haveno Vancouver de Kanado. Tre multaj**

加拿大 的 朋友 和 当地 华侨 上 船 参观，前后 共 有
Jiānádà de péngyǒu hé dāngdì huáqiáo shàng chuán cānguān, qiánhòu gòng yǒu
Kanado de amiko kaj loka ĉina elmigrinto sur ŝipo pririgaridi antaŭe poste kune esti
**kanadaj amikoj kaj lokaj ĉinaj elmigrintoj kune en nombro de pli ol kvar miloj surŝipiĝis**

四千 多 人。他們 从 这 艘 貨輪 看到了 新 中国 的 跃进
sìqiān duō rén. Tāmen cóng zhè sōu huòlún kàndàole xīn Zhōngguó de yuèjìn
kvar mil multa homo ili el ĉi tiu . . . varŝipo vidi nova Ĉinio de antaŭensalto
**por pririgardi ĝin. Ili vidis el ĉi tiu varŝipo la antaŭensaltan ritmon de la nova Ĉinio kaj**

步伐，热情 赞揚 新 中国 的 伟大。广大 华侨 更 是
bùfá, rèqíng zànyáng xīn Zhōngguó de wéidà. Guǎngdà huáqiáo gèng shì
paŝo varme laŭdi nova Ĉinio de grandioza vasta ĉina elmigrinto des pli esti
**varme laŭdis ĝian grandiozecon. La vasta ĉina elmigrintaro estis des pli**


精神 振奋。他們 説：“新 中国 的 伟大 使 我們 华侨 能夠
jīngshén zhènfèn. Tāmen shuō: “xīn Zhōngguó de wéidà shǐ wǒmen huáqiáo nénggòu
spirito plivigliĝi ili diri nova Ĉinio de grandioza igi ni ĉina elmigrinto povi
**vigligita en spirito. Ili diris: “La grandizoeco de la nova Ĉinio ebligas al ni ĉinaj elmigrintoj vivi**

挺起 腰杆 做 人。这 一切 都 归功 于 毛主席。”
tǐngqǐ yāogǎn zuò rén. Zhè yīqiē dōu guīgōng yú Máo zhǔxí.”
rektigi talio fariĝi homo ĉi ĉio tute atribuiĝi al Maŭ prezidanto)
**kiel homoj kun rektigita talio. Ĉion ĉi tion oni devas atribui al la merito de Prezidanto Maŭ.**

# Heroa Lando kaj Heroa Popolo

*La popolo de la liberigita regiono de suda Vjetnamio varme adiaŭas gejunulojn, kiuj aliĝas al la liberiga armeo.*






*Batalantoj de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio sturmas al la malamikoj.*





*Artilerio de la Vjetnama Popola Armeo severe punas usonajn banditojn.*



*Laboristoj de la Pumpil-fabriko Hai Duong de Vjetnamio aktive subtenas la agrikulturan produktadon. Jen laboristoj instalas pumpilojn por pumpstacio de la gubernio Gia Loc de la provinco Hai Hung.*



*Batalantoj de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio mem faras minojn por bati uson-pupan armeon.*



*La laboristoj de la Hanoja Fabriko de Elektraj Motoroj firme decidis subteni per bonegaj atingoj la batalon kontraŭ la usonaj agresantoj.*

*La vastaj amasoj de membroj de agrikulturaj kooperativoj en la norda parto de Vjetnamio pene faras produktan laboron por akiri multe da greno por subteni la batalfronton.*



LIU HUAJ:

# Maljuna Heroo Haŭ Ŝucaj

EN ordinara kaverndomo de la altebenejo de norda Ŝenhi-provinco, pendas portreto de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ meze sur la kontraŭporda muro, bonorde falditaj dekoloriĝinta armeana surtuto kaj malluksaj litaĵoj kuŝas sur la terlito kaj du benkoj staras sur la planko. La ĉambro spiras modestecon. La mastro de tiu domo estas neniu alia ol Haŭ Ŝucaj, fame konata ekstraklasa laborheroo de Ŝenhi-Gansu-Ninghia-limregiono en la pasintaj jaroj kaj nun vicĉefkomitatano de la Gubernia Revolucia Komitato de Janĉang, sekretario de la partia filio kaj ĉefkomitatano de la revolucia komitato de Tanŝijuan-brigado de Giaŭkoŭ-komunumo.

En la jaroj de la revoluciaj militoj, strikte sekvante la grandan gvidanton Prezidanto Maŭ, Haŭ Ŝucaj brave batalis kaj faris multajn meritojn. En 1943, en la granda produkta movado persone iniciatita kaj gvidata de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, Haŭ Ŝucaj kreis plej altan rekordon de la tuta armeo kulturebliginte 4.23 muojn da virga tero en unu tago kaj tiel fariĝis ekstraklasa laborheroo de Ŝenhi-Gansu-Ninghia-limregiono. Antaŭ 15 jaroj, kun la nobla aspiro konstrui socialisman novan kamparon, li revenis de la trupo al Tanŝijuan-vilaĝo de Janĉang-gubernio, kie li iam laboris kiel jardungito kaj faris revolucion. Ekde tiam ĝis nun, kun profunda proletara amo al Prezidanto Maŭ la maljuna heroo pene studis verkojn de Prezidanto Maŭ kaj faris novajn kontribuojn por la popolo elvolvante la Jan-an-an spiriton de penema lukto en malfaciloj.

Haŭ Ŝucaj devenis el familio de jardungitoj de tri generacioj. Kiam li estis okjara, liaj gepatroj kondukis lin kaj liajn du plijunajn fratinojn fuĝi aliloken pro katastrofo. Iun nokton, ili kuŝis malsataj interpremante apud porka stalo de bienulo por tranokti. Rimarkinte tion la bienulo ellasis sian hundon, kiu morde vundis lian patrinon, kaj pelis ilin el la vilaĝo.... Ruĝas la oriento, leviĝas la suno. En 1935, la granda gvidanto Prezidanto Maŭ gvidis la Ruĝan Armeon de Laboristoj kaj Kamparanoj al norda Ŝenhi, elsavis milojn kaj dekmilojn da mizeruloj kaj ankaŭ la familion de Haŭ Ŝucaj. Li trovis la vojon de liberiĝo por la malriĉuloj kaj aliĝis al la Ruĝa Armeo. La sekvintan jaron, li glore aliĝis al la Komunista Partio de Ĉinio kaj ĵuris batali dum la tuta vivo por komunismo.

En januaro de 1955, respondante al alvoko de la Partio Haŭ Ŝucaj, tiama estro de intendanta sekcio de la postfrontserva departemento de la Gansu-provinca Milita Regiono, petis permeson por reveni al la agrikultura fronto por daŭrigi la revolucion. Konsiderante ke li jam estas preskaŭ 50-jara kaj iam vundita, tiam la gvidantoj volis doni al li apartan favoron. Sed kamarado Haŭ Ŝucaj diris al la gvidantoj: "Se oni havas altan revolucian volon, oni povas plenumi taskon kiel ajn penigan." Tiamaniere, Haŭ Ŝucaj revenis al la kamparo kun sia familio.

Post reveno de la trupo al la kamparo, la vivo multe ŝanĝiĝis al li, sed Haŭ Ŝucaj ne ŝanĝis siajn naturon de laboranta popolo kaj stilon de penema lukto en malfaciloj. Ĉiutage li ellitiĝis frumatene, enlitiĝis noktomeze kaj senŝanceliĝe laboris por la revolucio 15 jarojn. La amasoj diris: "Nia maljuna heroo printempe plugas kampojn per pioĉo larĝklinga, somere sarkis per sarkilo kaj aŭtune rikoltis kun falĉilo, kaj li laboris tie, kien li alvenis. Liaj spuroj lasiĝis sur ĉiuj montvojetoj de la brigado kaj lia ŝvito gutis sur ĉiujn kampojn de la brigado." Haŭ Ŝucaj ofte diris: "Laboro estas devo de ni laboranta popolo, kaj tion ni neniam devas forlasi."

Iufoje, la brigado ne trovis konvenan homon por paŝtado, Haŭ Ŝucaj, la tiama sekretario de la partia ĝenerala filio, meminiciate prenis la paŝtan vipon kaj refoje fariĝis ŝafpaŝtisto. Tage li paŝtis ŝafojn kaj vespere iris al kunveno kaj faris sekretarian laboron spite al laco. Dank' al lia zorgema flegado, en unu jaro generiĝis 56 ŝafidoj kaj kolektiĝis kelkmil ĝinoj da sterko. Iufoje, kiam li paŝtis

ŝafojn, subite fulmis kaj tondris, ŝtormo kun hajlo atakis kaj monttorentego sin ĵetis, kiel muĝanta grego, al li kaj la ŝafoj. 38 ŝafoj estis envolvitaj en grandan akvoturniĝon en la valo. "Se nur mi Haŭ Ŝucaj vivas, mi absolute ne lasos, ke la posedaĵo de kolektivo trafu perdon!"

La maljuna heroo saltis en la torenton sen konsidero pri sia sekureco, batalis kontraŭ la torento por savi la ŝafojn, kaj finfine li sukcesis.

La maljuna heroo tutkore servas al la popolo, kaj la amasoj kore lin zorgas. Vidinte la abruptan ŝtormon, komunumanoj maltrankviliĝis pro maljuna Haŭ paŝtanta sur monto, kaj ili kuris unuj post aliaj sur montojn por serĉi lin.

Vidinte ke Haŭ Ŝucaj, tutkorpe tramalsekiĝinta kaj kovriĝinta de koto, estis malfacile pelanta la ŝafojn sur deklivon, la komunumanoj rapidis al li renkonte kaj transprenis la vipon, subtenis lin sub la brakoj kaj forviŝis por li la koton de sur lia vizaĝo. En tremo de frosto Haŭ Ŝucaj diris: "Ne zorgu min! Tuj nombru la ŝafojn kaj pelu ilin al la vilaĝo." La komunumanoj diris kortuŝite: La maljuna heroo kore zorgas la socialisman aferon, por la kolektivo li eĉ volontas oferi sian vivon.

Kiam Prezidanto Maŭ faris alvokon **"lerni de Daĝaj en agrikulturo"**, Haŭ Ŝucaj venis al Daĝaj de Ŝanhi-provinco por modeste lerni ĝiajn progresemajn spertojn. Sciiĝinte ke maljuna Haŭ venis de la revolucia sanktejo — Jan-an kaj estas ekstraklasa laborheroo en la granda produkta movado de Nannivan, Ĉen Jongguj, la sekretario de la Daĝaj-brigada partia filio, entuziasme akceptis lin kaj esprimis koran volon lerni de la maljuna heroo. Haŭ Ŝucaj sincere diris: "Vi estas ekzemplo de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj, do ni devas bone lerni de vi."

Dum la vizito al Daĝaj, Haŭ Ŝucaj pensis en si: En Daĝaj ĉie estas montoj kaj ŝtonoj, dum en nia loko ĉie estas teraj montoj; rilate al la kondiĉoj, la niaj estas pli bonaj ol tiuj de Daĝaj, sed kial nia produkto estas malpli bona ol tiu de Daĝaj? La ŝlosila problemo estas, ke la ruĝan

*Haŭ Ŝucaj (meze) lernas kune kun komunumanoj dum laborpaŭzo.*



standardon de Maŭzedongpenso ni tenas malpli alte ol Daĝaj, la spiriton de sinapogo sur la propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj ni elvolvas ne tiel bone kiel Daĝaj. Reveninte de Daĝaj, Haŭ Ŝucaj decidis gvidi la amasojn elvolvi la Jan-an-an spiriton kaj ĝisfunde transformi la fizionomion de Tanŝijuan. Li organizis la komunumanojn kompari sian brigadon kun Daĝaj por trovi sian nesufiĉecon kaj fari konkretan aranĝon. Krome, li vaste mobilizis amasojn konstrui ŝtuparajn kampojn kaj kamprandajn apogmurojn kaj fari aliajn agrikulturajn akvoutiligajn konstruojn.

En la brava batalo kontraŭ la naturo por transformo de la kampoj, Haŭ Ŝucaj sentis kvazaŭ li estus denove en la periodo de la granda produkta movado, kaj la vortoj de Prezidanto Maŭ ĉe la Akcepta Kunveno de Laborherooj de Ŝenhi-Gansu-Ninghia-limregiono **"Mi esperas ke vi... gvidos la popolon, amasojn kaj laboros pli bone"**, kvazaŭ sonus denove ĉe liaj oreloj. Same kiel en la pasinteco, kiam li kulturebligis virgan teron per larĝklinga pioĉo, li fosis frostiĝintan teron kaj vektoportis peze ŝarĝitajn korbojn sen plendo pro penigo kaj laciĝo. En frosta vintro, demetinte sian vatitan veston Haŭ Ŝucaj en veŝto laboregis svingante pioĉon. Iun nokton, kiam li ekpensis ke pli ol 30 ŝtonegoj pezaj po ĉ. 100 ĝinoj, kiuj estis lasitaj post finkonstruiĝo de apogmuroj, estis ankoraŭ ne transportitaj al nova konstruejo, kio certe malrapidigos la konstruadon de la sekvonta tago, li neniel povis endormiĝi, kaj antaŭ la tagiĝo li jam iris en mallumo al la konstruejo por dorse transporti la ŝtonegojn. Kiam la aliaj venis al laboro, la ŝtonegoj ĉiuj estis jam transportitaj al la nova konstruejo. Vidinte Haŭ Ŝucaj ŝviteganta, komunumanoj diris kortuŝite: "Majluna Haŭ, vi ja estas veterano kiu konservas la bravecon de la pasintaj jaroj!" Li modeste diris: "En la lasta nokto, studinte la artikolon pri 'Malsaĝa Avo', mi ekpensis pri la spirito de la Daĝaj-anoj plenaj je energio kaj sentis nin jam postrestantaj kaj maltrankviliĝis en la koro, mi do venis ĉi tien."

Sub la gvido de la partia filio kaj la revolucia komitato kaj sub la inspiro de la modelaj agoj de Haŭ Ŝucaj, elvolvante la Jan-an-an spiriton de penema lukto en malfaciloj, en la vintro kaj printempo de 1968, la komunumanoj de Tanŝijuan-brigado konstruis 120 muojn da ŝtuparaj ebenaj kampoj, kiuj povas garantii rikolton eĉ dum sekegeco aŭ superakvego, kaj rapide ŝanĝis la fizionomion de la monta regiono.

Tanŝijuan-brigado estas marŝanta antaŭen. La maljuna heroo Haŭ Ŝucaj estas elvolvanta sian energion kiel en la pasintaj jaroj, dum kiuj li faris revolucion sekvante Prezidanton Maŭ, kaj brave marŝanta antaŭen sur la larĝa vojo de daŭra revolucio.

# *Riĉa Rikolto de Santajĝuang-brigado*

SEKVANTE la instruon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ **"Disvolvi la revolucian tradicion por akiri pli grandan honoron"**, la komunumanoj de la produkta brigado Santajĝuang de Nannivan-komunumo de Jan-an-gubernio multe klopodis por disvolvi agrikulturon, akiris post luktado en malfaciloj meznombre pomuan grenprodukton de 405 ĝinoj kaj tiel fariĝis en la gubernio la unua brigado de alta produkto de greno.

Santajĝuang situas tuj apud Nannivan. Tie la vetero estas ofte malserena kaj humida kaj frue venas prujna periodo. En 1942, respondante la alvokon de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ, la komandantoj kaj batalantoj de la 359-a brigado de la Okavoja Armeo venis ĉi tien por ekspluati virgan teron. Ili kreis pli ol 40,000 muojn da bona agro kaj konstruis domojn kaj grotloĝejojn sume kun pli ol 400 ĉambroj, ŝanĝis la fizionomion de la veproplenaj montvaloj kaj kreis la miraklon ke armeo mem produktas siajn vivbezonaĵojn. Ĝi estis tipo de **"sinapogo sur propraj fortoj"** kaj **"penema luktado en malfaciloj"**, persone starigita

de la granda gvidanto Prezidanto Maŭ en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito En la tiam arde disvolviĝanta movado de produkto en la limregiono de Ŝenhi, Gansu kaj Ninghia, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj de Santajĝuang lernis de la komandantoj kaj batalantoj ekspluatantaj Nannivan kaj komencis sin provizi per sufiĉaj vestaĵoj kaj manĝaĵoj post penema laboro.

Post la Liberiĝo, kun la stariĝo de agrikulturaj kooperativoj kaj popolaj komunumoj okazis al Santajĝuang granda ŝanĝiĝo. Sed la popolanoj de Santajĝuang, kiuj havas profundan amon al Prezidanto Maŭ, neniam sentis kontentiĝon pro tio. Ili profunde disvolvis amasan movadon de viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso, tiel ke la komunumanoj starigis en si la penson terkulturi por la revolucio kaj akiris riĉan rikolton en sinsekvaj jaroj.

Antaŭ la vilaĝo de la produkta grupo Kiangiulongĉuan de la brigado, staras memoriga kiosko konstruita siatempe de la 359-a brigado por honori la martirojn, kiuj heroe oferis sian vivon en la Kontraŭjapana Rezistmilito. Ĉiun printempon la popolanoj de Santajĝuang vizitas la kioskon por memorigi la martirojn. Tie ĉi oni ofte okazigas kunvenon pri viva studo kaj viva apliko de Maŭzedongpenso. La kiosko fariĝis viveca klasĉambro de la vastaj amasoj de komunumanoj por lerni Nannivan-spiriton.

La popolo de Santajĝuang aŭskultas la vortojn de Prezidanto Maŭ, heredis kaj disvolvis la revolucian spiriton de **"sinapogo sur propraj fortoj"** kaj **"penema luktado en malfaciloj"**, elmontritan de la 359-a brigado en Nannivan, kaj faris kontribuon en la batalo por konstrui novan socialisman kamparon. En la lastaj jaroj, la amasoj konstruis per sia diligenta laboro 16 akvobaraĵojn, kaj riparis pli ol 600 muojn da teraskampo, kiuj ludis gravan rolon en la pliprodukto de greno.

En la konstruado de akvobaraĵoj kaj teraskampoj, la popolanoj de Santajĝuang faris tre penigan klopodon. Malgraŭ tranĉa frosto en vintro, ili marteladis por rompi frostigitan teron kaj faris kamprandan retenmuron. Por kiel eble plej frue fini la konstruadon, la komunumanoj iris al la konstruejo antaŭ sunleviĝo kaj revenis de ĝi post sunsubiro. Tagmanĝon ili prenis sur la konstruejo kaj hejmeniris nur kiam noktiĝis.

Sed vojo estas ĉiam zigzaga. Post la finkonstruo de la unua baraĵo, dank' al tio oni ricevis 30 muojn da rizkampo, estis fortega pluvo en somero, kaj la akvego breĉis la baraĵon, fluegante malsupren kvazaŭ senbridigita ĉevalo. Komunumanoj, kiuj loĝas proksime, tuj venis kun pordklapoj por ŝtopi la breĉon. Post kuna klopodo, ili venkis la akvegon kaj savis la baraĵon. Alifoje, estis nokto. Subite ekpluvegis. Komunumano Liu Fenghi venis la unua al la baraĵo. La akvego denove breĉis ĝin. En tiu kriza momento, recitante en si la grandan instruon de Prezidanto Maŭ **"Faru firman decidon, timu nenian oferon kaj superu ĉiujn malfacilojn por akiri venkon"**, li saltis en la akvon kaj ŝtopis la breĉon per sia korpo. Tiutempe ankaŭ aliaj komunumanoj alrapidis kaj post streĉa luktado ili fine ŝtopis la breĉon kaj savis la baraĵon.

En la batalo de transformo de malaltproduktaj kampoj, la brigado vaste disvolvis sciencan terkulturadon. Kamarado Ĉaŭ Huajhiu, sekretario de la partia filio, la unua faris eksperimenton de scienca terkulturado. Li elektis parcelon da mezbona tero, invitis kamaradojn de agrikultura teknika stacio kaj spertajn maljunajn kamparanojn kiel teknikajn konsilistojn por ŝanĝi la postrestintan kutimon en agrikulturado kaj efektivigi sciencan terkulturadon. Dank' al tio ili rikoltis 650 ĝinojn da greno sur unu muo. La efektiva ekzemplo komprenigis al la vastaj amasoj kaj kadroj, ke tute ekzistas la ebleco de grandmezura pliprodukto de greno. Tial ili vaste disvolvis en la tuta brigado sciencan terkulturadon, klopodis ĉiamaniere por altigi pomuan produktokvanton. Dank' al tio, ili rapide ŝanĝis la antaŭan postrestintan kutimon en terkulturado. Ili ofte iris en profundajn montojn kaj arbarojn por reporti fekundan teron kaj formi grasan tertavolon sur la vastaj sterilaj kampoj, kaj la produktokvanto de greno senĉese altiĝas.

En la pasinta jaro, Santajĝuang fariĝis la unua brigado de alta grenprodukto en Jan-an-gubernio. Kun la jaroj, ĝi vendis al la ŝtato pli kaj pli multan grenon kaj ankaŭ ĝia rezervita greno evidente kreskis. En la lastaj jaroj, kun la rapida disvolviĝo de grena produkto, ankaŭ la nombro de ĝiaj brutoj kreskis pli ol unuoble. Krome, la brigado aĉetis per sia propra mono traktoron kaj naŭ aliajn maŝinojn por semado, furaĝodispecigado kaj fojnotranĉado, efektivigis mekanikigon kaj duonmekanikigon de multaj laboroj, kaj tiel multe faciligis kaj ŝparis laboron de komunumanoj. En Santajĝuang ĉie prezentiĝas prospereco de nova socialisma kamparo.

# Provo antaŭ Granda Inundo

EN la komenco de julio de 1969, sinsekve falis pluvegoj en Tianmu-montara regiono de okcidenta Ĝegiang-provinco. La pluva kvanto de nur kelkaj tagoj jam atingis 320 mm. Pluvakvo amase altorentis de la ĉirkaŭaj montkrutaĵoj. Nanbaŭ-brigado, Jinĝu-komunumo de Tonglu-gubernio, kiu estas triflanke ĉirkaŭata de montoj kaj situas ĉe kunfluejo de 4 montaj riveretoj, suferis atakon de senprecedence granda superakvego.

La popolanoj de Nanbaŭ alfrontis severan provon.

## MALCEDEMO ANTAŬ SUPERAKVEGO

Antaŭ la alveno de la superakvego, Li Ginĵong, komunisto kaj estro de la brigada revolucia gvida grupo, tutnokte observis en pluvego la akvegan staton.

Dum la batalo kontraŭ la superakvego, la kadroj de Nanbaŭ-brigado organizis urĝsavajn sturmajn taĉmentojn kaj gvidis la amasojn kuri en ŝtormo rekte al la danĝeraj lokoj. Ili faris komunan ĵuron, ke kie estas danĝero, tien ili sturmos kaj ili nepre translokigos sur montojn la popolanojn kaj posedaĵojn de la kolektivo, eĉ se ili devos sin oferi por tio.

La kadroj kaj amasoj de Nanbaŭ-brigado efektivigis en vivdanĝero sian komunan ĵuron, sed la feroca superakvego detruis ilian vilaĝon kaj kampojn. Iliaj 1500 muoj da agroj komplete forlaviĝis, inter tiuj 400 muoj da bonaj kampoj fariĝis dezertejo plena de sablo kaj ŝtonoj.

Post la katastrofo, la Partio kaj la supera revolucia komitato provizore loĝigis la popolanojn de Nanbaŭ en Fenŝuj-urbeton, kiu distancas de Nanbaŭ 10 liojn. Informiĝinte pri tio, iliaj parencoj kaj amikoj alrapidis de diversaj lokoj por ilin vidi kaj invitis ilin al siaj lokoj por fiksloĝiĝo. Ankaŭ la dua frato de Li Ginĵong aparte venis de 20 lioj fore kaj invitis Ginĵong transloĝiĝi al lia loko. Sed Li Ginĵong kaj la membroj de la brigada revolucia gvida grupo firme decidis gvidi la amasojn rekonstrui sian hejmvilaĝon sur la ruino. Vicestroj de la gvida grupo Li Venhe kaj Ŝen Gaŭĵen diris firmvole: "La superakvego povas forlavi nian vilaĝon sed ne nian revolucian volon. Por liberigi Nanbaŭ, la martiroj forverŝis sian lastan guton da sango, ĉu ni ne povas rekonstrui Nanbaŭ post la katastrofo? Nur se ni agos unuanime, ni certe povos venki malfacilojn kiel ajn grandajn." "Prave!" Li Ginĵong diris, "timindaj ne estas la malfaciloj, timinda estas manko de aspiroj. Se nur ni kuraĝos porti pezajn ŝarĝojn kaj gvidi la amasojn al batalo, neniu malfacilo estas nevenkebla por ni!"

Unuflanke la revolucia gvida grupo de la brigado revenis al Nanbaŭ por esplori la detruon faritan de la katastrofo, aliflanke ĝi mobilizis la amasojn, energie propagandis Maŭzedongpenson, varme laŭdis la bonfarojn de Prezidanto Maŭ kaj la Komunista Partio, multe parolis pri la supereco de la socialisma sistemo kaj analizis la favorajn kondiĉojn en kolektiva batalo kontraŭ la katastrofo. Kun amo al la nova socio kaj malamo al la malnova socio, 73-jara malriĉkamparano He Baŭjoŭ faris penetrivan komparon de katastrofo antaŭ la Liberiĝo kun la nuna superakvego: En la jaro 1922, en Nanbaŭ okazis malgranda superakvo, kies nivelo estis 5 metrojn malpli alta ol tiu ĉi superakvego, sed tiam en Nanbaŭ-vilaĝo 10 familioj devis forvendi siajn infanojn, pli ol 20 familioj formigris por almozpeto kaj pli ol 40 familioj




*Komunumanoj de Nanbaŭ-brigado rekonstruas akvobarajon.*

devis labori kiel jardungitoj de bienuloj. Ĉi-foje kiam Nanbaŭ trafis pezan katastrofon, la partiaj organizoj, diversnivelaj revoluciaj komitatoj kaj ĈPLA-trupoj garnizonantaj en Ĝegiang-provinco sendis al la popolanoj de Nanbaŭ la ĉiamvenkan Maŭzedongpenson, intiman zorgon de la Partio kaj profundan amikecon de la vasta popolo. La du malsamaj rezultoj de du superakvegoj en du malsamaj socioj donis al la komunumanoj profundan edukon.

Neniu el la heroaj popolanoj de Nanbaŭ forlasis sian hejmlokon post la katastrofo. Ili starigis al si la penson ke la homoj certe povas venki la naturon, kaj komencis ardan batalon por rekonstrui sian hejmlokon.

## BATALO POR REPRENI LA PERDITAN GRENON

En Nanbaŭ post la katastrofo, ne estis eĉ loko por ripozo aŭ kuiro. Estis varmega somero. Ĉiutage ili iris pli ol 10 liojn de Fenŝuj-urbeto al Nanbaŭ por laboro. La Partio kaj diversnivelaj revoluciaj komitatoj ilin tre zorgis, sendis al ili helpajn materialojn kaj la ĉirkaŭaj brigadoj unu post alia alvenis por ilin helpi en laboro. Ĉe tiu tempo, iuj diris ke nun ĉia deziro de ili povas esti kontentigita, do ili devas kapti la ŝancon unue konstrui nombron da domoj. Sed plejparto de la komunumanoj opiniis ke oni devas urĝe rikolti kaj semi grenon laŭ sezona bezono kaj konstrui domojn poste.

Ĉu oni devas venki la malfacilojn sin apogante sur la ŝtato kaj subteno de aliaj aŭ sur la propraj fortoj? Ĉu oni metu la restarigon kaj disvolvon de produkto en la unuan lokon aŭ unue rekonstruu domojn forlasinte la produkton? Post ripetada lerno de instruoj de Prezidanto Maŭ pri **"sinapogo sur propraj fortoj"** kaj **"penema luktado en malfaciloj"**, la kadroj unuvoĉe diris: "Ni havas nur la devon fari kontribuon al la ŝtato, sed ne havas la rajton postuli favoron de la ŝtato. Ni devas lerni la spiriton de Daĝaj, nin apogi sur la fortoj de la amasoj kaj batalakiri grenon el la katastrofo de superakvego."

Tiutempe la postrestanta frua rizo jam maturiĝis, la tempo por transplantado de malfrua rizo jam proksimiĝis. Estis multaj malfaciloj en la rikoltado kaj plantado post la katastrofo. En pli ol 1,300 muoj da kampoj de frua rizo, la restaj rizplantoj plejparte estis faligitaj de koto kaj ŝtonoj, ili do forprenis la ŝtonojn kaj falĉis la rizplantojn. El tiuj rizkampoj pli ol 300 muoj estis kovritaj de ŝtona tavolo dika je 1 aŭ 2 futoj, por rikolti la maldensajn rizospikojn inter ŝtonoj ili ne povis uzi falĉilon, ili do forigis ŝtonojn per siaj manoj por ilin falĉi. Multaj komunumanoj vundis siajn manojn pro frotado, sed ankoraŭ persistis en la laboro.

En la batalo por akiri grenon, ĉiu el la kadroj de Nanbaŭ-brigado prenis al si pezan laboron. Parcelo da rizkampo apud rivereto estis tute kovrita de ŝtonoj alportitaj de la superakvego, tiel ke oni eĉ ne povis vidi rizospikojn kaj estis tre malfacile ilin elfosi. La kadroj gvidis komunumanojn forigi ŝtonojn kaj elpreni la rizospikojn sub brula suno starante sur varmegaj ŝtonoj. Tiamaniere, ili elprenis el inter ŝtonoj 230,000 ĝinojn da rizo en pli ol unu monato.

Samtempe kun la urĝa rikolto, ili senprokraste plantis pli ol 370 muojn da malfrua rizo, kaj sur ĉirkaŭ 600 muoj da kampoj, sur kiuj portempe oni ne povis planti rizon, ili ĝustatempe semis maizon kaj fagopiron. Krome, ili grandkvante plantis legomojn sur la ruino de la vilaĝo.

## REKONSTRUI LA HEJMLOKON SUR LA RUINO

La superakvego transformis la Daĝaj-tipajn kampojn de Nanbaŭ en dezertejon de sablo kaj ŝtonoj, kaj iuj el ili fariĝis tero malmola kiel ŝtona tabulo. Estis multaj malfaciloj por transformi tian teron. Plej forta bovo ne povis ĝin plugi, kaj 35-ĉevalpova traktoro apenaŭ povis plugi sulketojn. Vidinte tion, preterpasantoj diris: "Ĉu oni povus kulturi grenon sur tia ŝtona parcelo? Eĉ herboj povos kreski nur post 3 jaroj!"

Sed, la malfaciloj ne timigis la heroojn armitajn per Maŭzedongpenso. Li Ginĵong gvidis komunumanojn voĉlegi la brilan artikolon *Montotranslokigo Fare de Malsaĝa Avo*. La senŝanceliĝema spirito de la Malsaĝa Avo kuraĝigis ĉiujn. Kun alta batalvolo la komunumanoj diris: "Eĉ se ĝi estus 'fera parcelo' ni dispecigos ĝin iom post iom!" Dirante ili ĉiuj kune rapidis al la "ŝtona parcelo" kaj ekfosis senĉese svingante ŝpatojn kaj pioĉojn. Rompiĝis iuj ŝpatoj, sur manoj de multaj homoj aperis sangaj vezikoj, ŝvelis la brakoj de multaj fosantoj, sed neniu plendis pro penigo kaj laco. Vang Genjue, komunistino kaj membro de la revolucia gvida grupo de la brigado, gvidis virinan sturman taĉmenton fosadi energie kun pioĉo peza je 7-8 ĝinoj same kiel la viraj komunumanoj. Tiamaniere, ili laboris tage kaj nokte, kaj manĝis kaj ripozis sen forlaso de la laborejo. Post laborado de 7 tagoj, ili finfine konkeris la "ŝtonan parcelon".

La superakvego detruis digon de Nanbaŭ, sed la popolanoj de Nanbaŭ denove konstruis per peniga batalo de unu vintro digon altan je 4 metroj, larĝan je 20 metroj kaj longan je 700 metroj sur bordo de Tianmu-rivereto.

La digo povas rezisti kontraŭ superakvego, sed kion fari kontraŭ senpluveco? Elirante de la granda strategia penso de Prezidanto Maŭ **"sinprepari kontraŭ milito, sinprepari kontraŭ naturaj katastrofoj kaj fari ĉion por la popolo"**, la popolanoj de Nanbaŭ decidis realigi memfluan irigacion de rizkampoj kaj krei kampojn de certa riĉrikolto malgraŭ centtaga senpluveco. Dum konstruo de la digo ili samtempe komencis konstruon de tunelo por konduki akvon tra monto. Por frue plenumi la konstruon, dekkelkaj junuloj laboris tage kaj nokte, pintaj ferstangoj longaj je 1 metro fariĝis tre mallongaj stumpoj pro frotado. En malpli ol 3 monatoj ili per siaj feraj manoj traboris monton, konstruis tunelon longan je 114 metroj kun diametro de 2.5 metroj, kaj tiel aldonis al Nanbaŭ novan belon.

En mallonga tempo de 10 monatoj, per siaj diligentaj manoj la popolanoj de Nanbaŭ konstruis sian belan hejmlokon sur la ruino post la superakvego. Ili konstruis domojn kun 245 ĉambroj sur verdaj montodeklivoj kaj instalis al ĉiuj domoj elektrajn lampojn. En la vilaĝo instaliĝis disaŭdigiloj, krome, oni ankaŭ fondis prilaborejojn kaj lignosegejon kies maŝinoj bruadas. En la nova vilaĝo fondiĝis ankaŭ Hinhua-librejo, butiko, komuna manĝejo kaj higiena stacio. En la nove starigita paŝtejo, oni bredas pli ol 400 porkojn, pli ol 20 kaprojn kaj proksimume 100 bovojn. La digo apud Tianmu-rivereto protektas 500 muojn da malaltaj kampoj kontraŭ atako de superakvego. La dise lokitaj akvokonservejoj, lagetoj kaj pumpstacioj kondukis tra kanaletoj akvon al 1,000 muoj da bonaj kampoj. En tiu jaro, kvankam ili suferis de eksterordinare granda superakvego, tamen ili rikoltis 540,000 ĝinojn da greno kaj tiel efektivigis memprovizon de greno kun superfluaĵo.




# Trajno Subtenanta Agrikulturon

SUR la suda parto de Tongpu-fervojo de Ŝanhi-provinco konstante veturas trajno, kiu estas nek ordinara varvagonaro, nek pasaĝera vagonaro. La amasoj loĝantaj apud la fervojo intime nomas ĝin Trajno Subtenanta Agrikulturon.

Tiu trajno konsistas el vagonoj kovrilaj kaj senkovrilaj, vagonoj por varoj kun supernorma longeco, vagonoj por bovoj, ĉevaloj k. a. brutoj, vagonoj por malgrandaj dombestoj kaj abeloj kaj ankaŭ vagonoj por agrikulturaj insektomortigiloj kaj kemiaj sterkoj.

Konforme al la bezono de transportado en subteno al agrikulturo, tiu trajno haltas je ĉiu stacio kaj la tempo de ĝia ekveturo kaj atingo estas difinita. Estas nefacile por la trajno fari tion, ĉar la kvanto de envagonigendaj aŭ elvagonigendaj varoj de ĉiu stacio estas ne fiksita kaj la malfacileco de la ŝarĝaj kaj malŝarĝaj laboroj estas neegala. Sed la laborantoj de tiu trajno senĉese venkas malfacilojn kaj garantias la regulan iradon de la trajno kaj ĝustatempan plenumon de transportado.

Foje ŝarĝite kaj malŝarĝite en iu stacio, la trajno devis ekveturi post kvin minutoj. Ĝuste en tiu tempo oni alsendis 25 agrikulturajn maŝinojn kiuj devis esti urĝe forportataj. Kvankam la tempo estis urĝa kaj la tasko peza, sed la laborantoj de la trajno esprimis, ke firme respondecante por la popolo ili forportos tiujn maŝinojn. Ili do tuj helpis laborantojn de la stacio fari registradon kaj ŝarĝadon. Tiamaniere ili finplenumis la taskon de ŝarĝado en kvin minutoj kaj la trajno ekveturis je la difinita horo.

Kutime, la tasko de transportado estas nur porti varojn al celloko. Sed la laborantoj de tiu trajno ĉiam montras grandan respondecon pri posedaĵoj de la popolo, bone zorgante materialojn por subteno al agrikulturo. Ili pretigis en la trajno kudrilojn, fadenojn kaj instrumentojn. Se pakaĵo de kamparano estas nebone pakita aŭ difektita, ili tuj ĝin riparas aŭ kudras.

Ankaŭ la transporta procedo de tiu trajno estas oportuna por la amasoj. Se la tempo estas tre urĝa, la laborantoj do lasas unue envagonigi la varojn kaj poste fari la registradon, rompante la ordinaran regularon. En marto de la kuranta jaro, kiam la trajno haltis en iu stacio por ŝarĝo kaj malŝarĝo, la laborantoj rimarkis ke du komunumanoj rapidas al la stacio kondukante du mulojn. Post demando ili sciis, ke la du komunumanoj devas sendi tiujn du mulojn al loko 50 kilometrojn fora por ricevi kuracon. Se ili piediros tien, tio tro malfruigos kuracon kaj se ili veturos per vagonaro, tio multe kostos al la kolektivo. Laborantoj de la vagonaro diris al ili, ke transportado per tiu trajno estas tre malmultekosta kaj oportuna. Ili helpis la komunumanojn envagonigi la malsanajn mulojn, faris por ili registradon kaj lasis ilin ripozi en ripoza vagono. La lastaj estis tre kortuŝitaj.

Survoje la trajno ofte renkontas neatenditajn okazojn kaj la laborantoj de la trajno ĉiam klopodas laŭeble por ilin solvi. Foje la trajno transportis ĉevalojn. Post ekiro de la trajno la ĉevaloeskortanto trovis ke la nutraĵo por la ĉevaloj jam estas finkonsumita. La laborantoj do kontaktis kun kelkaj stacioj sur la vojo kaj solvis la malfacilon.

En la lastaj pli ol ses jaroj, sub la direktado de la revolucia linio de Prezidanto Maŭ, tiu trajno faris grandan atingon en subteno al agrikulturo. La laborantoj de tiu trajno decidis daŭre antaŭenmarŝi kaj fari ankoraŭ pli grandan kontribuon por disvolvo de nia agrikultura produkto.

---

## Korespondi Deziras

**NORVEGIO**

55-jara fervojisto kaj lia 60-jara kolego dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj pri ĉiutaga vivo. La adresoj: Odd Kolbrek, Kaldbakkstubben 22, Oslo 9

Gunnar Flenvang, Kaldbakkslyngen 22, Oslo 9

**ĈEĤOSLOVAKIO**

35-jara maŝininĝeniero Vasil Kelemeca dez. kor. pri maŝino, tekniko, psikologio kaj sociologio. La adreso: Snina ul Kollarova 905.

Rudolf Suŝarsky dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj geamikoj kaj interŝ. monerojn, medalojn, poŝtmarkojn kaj insignojn. La adreso: Nove Mesto nad Vahom 630. Rybarska 3. okr. Trencim.

**FRANCIO**

Dez. kor. kun ĉinaj kaj alilandaj geamikoj Jacques Villeminot. Le Nid 42, Les Grands Paquis, 54 Saulxures Pes Nancy.

**OKCIDENTA GERMANIO**

Dez. kor. Erasmus Zilles, 673 Neustadl / Weinstr. Okc. Germanio, Hauptstr. 39/41

# Kia Varo Estas la "Plano de Rogers"?

LA ŝtata sekretario de Usono William Pierce Rogers fanfaronis, sub la mantelo de "paco", pri sia tiel nomata "politika iniciato", elĵetita je la 19-a de junio por solvi la mezorientan problemon, kiel io helpa al la starigo de "justa kaj longdaŭra paco" dezirata de la popoloj de la Meza Oriento. Fakte, ĝi estas nenio alia ol "munĥena" intrigo en la Meza Oriento por realigi la sonĝon de la "superpotencoj" distranĉi la Mezan Orienton en siajn influsferojn je la kosto de la interesoj de la palestina kaj aliaj arabaj popoloj.

Unue, ĝi postulas "la flankojn ĉesigi pafadon" kaj "restarigi fajroĉesigon". La "flankoj" estas fakte la du flankoj: la uson-izraelaj agresantoj en unu flanko, kaj Palestino kaj aliaj arabaj landoj, la viktimoj de agresado, en la alia. Tio signifas, ke la uson-izraelaj agresantoj havas la rajton fari militon de agreso kontraŭ la arabaj landoj, dum la lastaj, la viktimoj de agreso, devas ĉesigi sian rebaton kontraŭ la agresantoj. La tiel nomata "fajroĉesigo" signifas, ke la palestina popolo ne povas fari armitan batalon por nacia liberigo, ke la arabaj landoj ne povas disvolvi batalon kontraŭ la uson-izraelaj agresantoj kaj ke la uson-izraelaj agresantoj povas akiri legitiman pozicion por solidigi siajn agresajn poziciojn. La palestinaj gerilaj taĉmentoj, kiuj travidis la insidan celon de tiu ĉi "fajroĉesigo", respondis firme: "Ne!"

Due, ĝi postulas la agnoskon de la "suvereneco, sendependeco kaj teritoria integreco de Izraelo". Se oni agas laŭ tiu ĉi postulo, tio signifas agnoski, ke la lakeo de la usona imperiismo Izraelo povas eterne senigi la palestinan popolon je la suvereneco, dum la palestina popolo neniam povos restarigi la sanktan suverenecon super sia teritorio; tio signifas agnoski, ke la izraela cionismo fabrikita de la usona imperiismo povas laŭleĝe ekzisti, dum la arabaj popoloj ne povas efektivigi sendependecon kaj liberigon de la araba nacio; tio signifas legitimon de la agreso farita de Izraelo al la teritorio de la arabaj landoj. Evidente, agnoski la tiel nomatajn "suverenecon, sendependecon kaj teritorian integrecon de Izraelo" signifas forstreki la nacilberigan aferon de la palestina popolo, garantii al la usona imperiismo daŭrigon de posedo de la agresaj bazoj en la Meza Oriento. La palestina kaj la aliaj arabaj popoloj firme oponas kontraŭ tiu ĉi nepravigebla postulo de la usona imperiismo!

Trie, ĝi postulas protekti la "intereson de Usono". La usona imperiismo ofte diris tute senkaŝe, ke la Meza Oriento estas "ekstreme grava" por ĝi, kaj tial, "politika solvo" estas necesa por protekti la intereson de la usona imperiismo. Kio estas la intereso de la usona imperiismo? Nixon diris multfoje: unue petrolo, due la strategia pozicio. La intereso distrumpetita de la usona imperiismo estas nenio alia ol tiu de agresantoj kaj de rabantoj. La neta profito, kiun la usonaj oleaj magnatoj rabas el la mezorienta oleo, atingas pli ol miliardon da usonaj dolaroj ĉiujare. Ne kontentante pri tio, ili ankoraŭ volas elpremi pli grandan profiton. Laŭ la kontraŭrevolucia tutgloba "strategia intereso" de Pentagono, la usona imperiismo vane esperas okupi la tutan mezorientan strategian pasejon por faciligi siajn pluapaŝajn kontrolon super Eŭropo kaj agreson kontraŭ Azio




*Irakaj kaj palestinaj popolanoj kaj gerilaj batalantoj en Bagdad faras grandiozan manifestacion por indigne kondamni la kriman intrigon de la usona imperiismo vane provi estingi la armitan batalon de la palestina popolo kaj aliaj arabaj popoloj.*

kaj Afriko. Nun la usona imperiismo hastas antaŭenpuŝi la intrigon de "politika solvo" ĝuste por efektivigi siajn politikojn de agreso kaj milito sed absolute ne la tiel nomatan "justan kaj longdaŭran pacon" en la Meza Oriento. Ĉu tio ne estas tute evidenta?

Kvare, ĝi postulas "konservi la ekvilibron de forto" en la Meza Oriento. Ĉirkaŭ la tempo kiam Rogers elĵetis la "politikan iniciaton", la ĉefo de la usona imperiismo Nixon plenenergie distrumpetis la absurdaĵon ke la du tiel nomataj "superpotencoj" konservu "la ekvilibron de forto en la Meza Oriento". Unuflanke, la usona imperiismo celas kovri sian krimon de intensigo de la armado de Izraelo, kaj aliflanke, koluzii kaj "kunlabori" kun la alia tiel nomata "superpotenco" por antaŭenpuŝi "munĥenan" intrigon en la Meza Oriento. Timante la usonan imperiismon kaj plie la revolucion, iuj personoj de la alia tiel nomata "superpotenco", en komploto kun la usona imperiismo, serveme klopodas por efektivigi la kriman intrigon, kun la vana espero devigi la palestinan kaj la aliajn arabajn popolojn forlasi sian justan batalon.

La absurdaĵo de la tiel nomata "konservo de ekvilibro de forto" estas nenio alia ol sinonimo por la vana provo de la "superpotencoj" por ĉasi kaj dividi influsferojn en la Meza Oriento. Laŭ tiu ĉi absurdaĵo, la "du superpotencoj" povas decidi la sorton de la Meza Oriento, dividi influsferojn tie, prenas la malgrandajn landojn kiel siajn viktimojn kaj laŭplaĉe pridisponi ilin. Tio estas centpocente rabista logiko de ĝangala leĝo de grandregna hegemonio.

Sed, la vekiĝintaj arabaj popoloj firme oponas kontraŭ la "politika iniciato" de Rogers. Nuntempe, tiu, kiu decidas la sorton de la Meza Oriento, estas la centmiliona araba popolo sed absolute ne unu aŭ du "superpotencoj". Jam forpasis por eterne la epoko, en kiu grandaj potencoj decidis la sorton de malgrandaj landoj. Tio estas leĝo de historio. Se unu aŭ du "superpotencoj" obstinas agi kontraŭ tiu ĉi leĝo de historio, revas tiri la radon de historio retroen al la tridekaj jaroj de la nuna jarcento por ripeti en la Meza Oriento la "munĥenan" intrigon de la tridekaj jaroj, ili certe frapiĝos per sia kapo kontraŭ muro.

# Ni Decidis Persisti en la Batalo

EN iu vespero je la fino de julio, trejnejo de "Al-Assifa" de gerila bazo de la Palestina Naciliberiga Movado (Al-Fateh) okazigis neordinaran ceremonion por celebri la finon de lernado de grupo da novaj batalantoj. Tiu ceremonio saturita de batala atmosfero plene manifestis la ŝtalan volon de la palestina popolo maltimi perforton, kuraĝi oponi kontraŭ unu aŭ du "superpotencoj" kaj firme frakasi intrigon kovitan de ili "pace solvi" la mezorientajn problemojn.

La ceremonio komenciĝis per pafpraktika manovro en atako kontraŭ imagita izraela milita apogpunkto:

Je vespera krepuskiĝo, la imagita zono okupita de Izraelo estis en mallumo. Izraelaj agresantoj sin kaŝis en la apogpunkto kaj nur iuj patrolaj soldatoj sin movis maltrankvile. Tiam la novaj palestinaj batalantoj dividitaj en 6 grupetojn, helpate de milicanoj, senbrue iris en la malamikan zonon kaj embuskis respektive. Iom poste, subite leviĝis ruĝa signalkuglo en la malluma ĉielo. La gerilaj grupetoj tuj komencis sian aktivadon. "Bum" — je eksploda bruego detruiĝis ponto sur la ĉefa vojo. Tuj post tio aŭdiĝis intensa pafado kaj du izraelaj patroloj estis komplete ekstermitaj. Tiutempe la milita apogpunkto de la "malamiko" izoliĝis kaj falis en senhelpecon, sturma grupeto de la gerila brigado tuj lanĉis atakon. Post brava batalo ĝi sieĝis kaj ekstermis la "malamikojn" en la apogpunkto, kaj poste eksplodigis la apogpun-



*Palestinaj milicanoj en milita trejnado*



*Palestinaj gerilanoj kaj amasoj manifestacias en Amman, la ĉefurbo de Jordano por oponi la novan intrigon de "paco" fare de la usona imperiismo.*

kton. Venke plenuminte la taskon, la gerilaj batalantoj retiriĝis rapide kaj sekure.

Tiu manovro estis karakterizita per rapideco, braveco, sagaceco kaj fleksebleco. La gerila komandanto, kiu direktis la manovron, diris: "Nia batala principo estas laŭ la instruo de Prezidanto Maŭ **'longdaŭra milito en strategio kaj rapiddecida batalo en operacio aŭ batalo'**."

Post la manovro, la novaj batalantoj kolektiĝis sur placo de la trejnejo por kunveno. Iu respondeculo de "Al-Fateh" diris en la kunveno: "Ni firme oponas kontraŭ 'Rogers-plano' de la usona imperiismo kaj ĉiuj projektoj de t. n. 'paca solvo' de la mezorientaj problemoj, ĉar ĉiuj ĉi tiuj projektoj celas leĝigi la agreson de Usono kaj Izraelo. Ni povas frakasi ilian agreson nur per milito kaj oponi maljustan militon per la justa. Armita batalo estas la sola vojo por liberigi la okupitan palestinan kaj araban teritorion. Ni devas persisti en la batalo kaj neniel devas forlasi la armilojn!"

Ankaŭ reprezentanto de la batalantoj faris paroladon. Li diris: "Nun imperiismo energie kovas intrigon de 'paca solvo', intencante ekstermi nian palestinan revolucion. Ni ĵuras: kiom ajn grandajn malfacilojn nia batalo renkontos kaj kiom ajn grandajn kostojn ni devos pagi, ni absolute ne kapitulacos kaj ni nepre daŭrigos nian batalon! Ni konduku la revolucion ĝis la venko kaj liberiĝo!"


Tiuj vortoj plialtigis la batalvolon de la batalantoj, kiuj laŭte ĵuris: "Ni firme persistos en la batalo. Ni revoluciu ĝis la venko!"

Tiuj bravaj junaj batalantoj estis tuj marŝontaj al la batala fronto, enirontaj zonon okupitan de Izraelo kaj forte batontaj la uson-izraelajn agresantojn kune kun la veteranaj gerilaj batalantoj.

En la bazo alia grupo de palestinaj junuloj rigardis la pafpraktikan manovron de la palestinaj batalantoj kiuj finis sian lernadon. Ili lastatempe partoprenis entuziasme la palestinan gerilan trupon por defendi la palestinan revolucion kaj ricevos trejnon en la sekvonta kurso de la trejnejo. La respondeculo de la trejnejo diris al raportisto: "Nun la usona imperiismo energie kovas la intrigon de 'paca solvo' de la mezorientaj problemoj. Nia respondo al tio estas: Pli da palestinaj kaj arabaj junuloj partoprenos en la gerila trupo,

kaj ni trejnos pli da gerilaj batalantoj kaj faros pli da bataloj. La granda gvidanto de la ĉina popolo Prezidanto Maŭ instruas: **'La usona imperiismo aspektas kiel koloso, sed ĝi en esenco estas papera tigro kaj faras agonian baraktadon.'** Tio estas granda kuraĝigo por ni. Ni decideme unuiĝos kun la tutmondaj popoloj por venki la usonajn agresantojn kaj ĉiujn iliajn lakeojn!"

*Izraela vagonaro detruita de palestinaj gerilanoj*






## NOVA MAŜINO POR UNUPROCEDA TINKTURADO DE KOTONFADENO

Energie kondukante teknikan renovigon, la vastaj amasoj de laboristoj de la Kvara Fadentinktura kaj Teksa Fabriko de Ŝanhajo sukcesis krei ĉinstilan maŝinon por unuproceda tinkturado de kotonfadeno kaj tiel surgrimpis la pinton de la monda fadentinktura tekniko.

La kreo de la maŝino por unuproceda tinkturado de kotonfadeno estas alia sukceso akirita de la ŝpinteksaj laboristoj de Ŝanhajo post la kreo de la nova teknologio de unuproceda tinkturado de kotonŝtofo. Tiu maŝino aplikis tute novan teknologion kreitan de ni mem kaj ĝiaj ĉefaj avantaĝoj estas: Unue, ĝi povas plenumi en unu fojo la teknologiajn postulojn de kolorigo de fadenoj, kiun oni antaŭe devis plenumi en 16 procedoj. Pasinte por plenumo de la tuta fadentinktura procedaro oni bezonis ĉ. 80 grandajn kaj malgrandajn maŝinojn. Nun la tuta fabriko bezonas nur 4 novtipajn tinkturajn maŝinojn por atingi la antaŭan nivelon de produktokvanto. Due, dank' al apliko de la nova teknologio, oni povas ŝpari grandan kvanton da karbo, elektro kaj kemia materialo, kaj krome oni ankaŭ solvis problemojn de iuj kolorigaj teknikoj, kiujn oni ne povis solvi per la malnova teknologio. La fortikeco de ŝtofo el fadenoj tiel tinkturitaj estas ĉ. 20 pocentojn pli alta ol tiu de la ordinara. Trie, antaŭe ok-taga estis la periodo de la enporto de blankaj fadenoj en la fabrikon ĝis elporto de kolorigitaj fadenoj el la fabriko. Post apliko de la nova teknologio, ĝi mallongiĝis ĝis 2 tagoj kaj krome ĉ. 50 pocentoj de laborforto estis ŝparitaj kaj multe malpliiĝis la laborintenseco.

# La Kamboĝa Naciliberiga Armeo Gajnis Grandajn Venkojn


Lastatempe la Kamboĝa Naciliberiga Armeo senĉese faris atakojn kaj draŝis la sajgonajn pupajn trupojn en la provincoj Prey Veng kaj Kompong Cham kaj gajnis grandajn venkojn.

En la 11-a de aŭgusto, la Kamboĝa Naciliberiga Armeo atakis la sajgonajn pupajn trupojn kiuj faris "serĉan kaj detruan" operacion en Kamchay Mea de la provinco Prey Veng, grave vundis unu batalionon kaj militkaptis multe da malamikoj, multajn pafilojn kaj aliajn armilojn kaj grandan kvanton da militaj materialoj.

En la provinco Kompong Cham, la naciliberiga armeo atakis je la 3-a de aŭgusto, malamikan veturilaron unu kilometron nordoriente de Krek, detruis 10 malamikajn kirasaŭtojn M-113 kaj mortigis aŭ vundis 50 soldatojn de sajgona pupa armeo. En la sama tago, artileria trupo de la naciliberiga armeo bombardis la malamikajn poziciojn 6 kilometrojn nordoriente de Krek, kaj detruis 14 malamikajn militveturilojn kaj mortigis 75 soldatojn de sajgona pupa armeo. Kaj

*Sudvjetnamaj pup-armeanoj batitaj de la Naciliberiga Armeo de Kamboĝo forfuĝis en paniko.*





*Batalantoj de la Popolaj Liberigaj Armitaj Fortoj de Suda Vjetnamio aktive lanĉas atakon al uson-pupa trupo.*

krome, en la sama regiono la batalantoj de la liberiga armeo faris obstrukcan atakon, detruis 3 malamikajn militveturilojn kaj mortigis 60 malamikojn.

En la 3-a de aŭgusto, la naciliberiga armeo atakis sajgonan pupan trupon kaj ekstermis pli ol 30 malamikojn, 8 kilometrojn oriente de Co Re Chi de Kompong Cham. En la sekvinta tago, la naciliberiga armeo bombardis la malamikan kantonmenton 7 kilometrojn oriente de Co Re Chi, detruis 3 kanonojn, 2 minĵetilojn kaj 3 kamionojn de la malamiko, kaj mortigis kaj vundis 30 soldatojn de sajgona pupa armeo. En la 7-a, la naciliberiga armeo atakis roton de la sajgona pupa armeo en loko 7 kilometrojn sude de Co Re Chi kaj ekstermis 45 malamikojn.

## Vasta Ofensivo de la Armeo kaj Popolo de Suda Vjetnamio

Por celebri la 25-an datrevenon de la Aŭgusta Revolucio kaj la fondo de la Vjetnama Demokratia Respubliko, la armeo kaj popolo en la regiono Quang Tri — Thua Thien — Hue lastatempe entuziasme disvolvis konkurson por mortigi malamikojn, faris sinsekvajn atakojn al malamikoj tra la vastaj areoj en la ebenejoj, montregionoj kaj urboj kaj faris multajn novajn meritojn en la milito. Laŭ nekompleta statistiko, la armeo kaj popolo en la supre dirita regiono ekstermis, en la unua duono de aŭgusto, ĉ. 1,570 usonajn kaj pupajn armeanojn, inkluzive 3 pupajn batalionojn grave vunditajn, unu usonan roton kaj unu usonan plotonon tute eliminitajn, paffaligis 64 aviadilojn, detruis 10 militajn veturilojn kaj kanonojn, forbruligis unu municiantenejon kaj unu benzinan tenejon, forbruligis aŭ detruis entute ĉ. 40 kazernojn kaj fortikaĵojn kaj renversis 2 militajn trajnojn.

En la sama periodo, la popolaj liberigaj armitaj fortoj atakis multajn postfrontajn bazojn de la malamiko. La liberiga armeo ekstermis 250 malamikojn en du bataloj en Nam Hoa kaj Mang Ca.

# Palestinaj Gerilaj Taĉmentoj Forte Batis Izraelajn Agresajn Trupojn

Palestinaj gerilaj taĉmentoj forte batis la izraelajn agresajn trupojn en la okupitaj Jordan-valo, Golan-altaĵo kaj Gaza-zono.

En la 9-a de aŭgusto, unu izraela aviadilo estis paftrafita apud Jericho sur la okupita okcidenta bordo de Jordan-rivero. La aviadilo falis kaj detruiĝis sur strato en Jericho. En la 9-a kaj 10-a de aŭgusto, la palestinaj gerilaj taĉmentoj faris pli ol 20 atakojn al la malamiko, mortigis 45 izraelajn armeanojn, vundis multajn kaj detruis 8 militajn veturilojn. Ili embuskis 6 izraelajn patrolojn, detruis 4 izraelajn embuskajn punktojn kaj antaŭenirajn ŝirmejojn.

En la 9-a de aŭgusto, "Al Assifa" kaj sturma taĉmento de la Palestina Popola Batala Fronto embuskis izraelan patrolon ĉe la vojo inter Maghtas kaj Awama en Jordan-valo, detruis 2 malamikajn militveturilojn kaj ekstermis pli ol 25 malamikojn. La palestinaj gerilaj taĉmentoj solide batis ankaŭ la malamikajn helptrupojn, detruis 4 kaj difektis 2 izraelajn veturilojn por transporto de soldatoj, ekstermis 35 malamikojn, kaj la restantaj izraelaj armeanoj forkuris en paniko. En la sama tago, en la Araba Valo kaj sur la okcidenta bordo de Jordan-rivero, palestinaj gerilaj taĉmentoj eksplodigis 4 malamikajn militveturilojn, inkluzive unu raŭpiran. "Al Assifa" detruis unu malamikan embuskan punkton en Oum Sedra en Jordan-valo kaj ekstermis ĉiujn ses malamikojn tie.

En la 12-a, ses trupoj de palestinaj sturmaj organizoj faris kunan atakon al izraelaj pozicioj sur la deklivoj de Hermon-monto, kaj kaŭzis al la malamiko multajn mortojn, vundojn kaj perdojn.

*Bravaj palestinaj milicaninoj*



*Sur la Kovrilo:*

Laboristoj de la Kultivejo de Bonspeciaj Semoj de Ŝunji-gubernio de Pekino elkulturis multajn bonajn speciojn de tritiko, maizo, kotono k. a. Jen ili esploras la kreskan staton de altprodukta kotono.

*Sur la Dorskovrilo:*

Komunumano de Ŝaŝiju-brigado de Zunhua-gubernio de Hebej-provinco rikoltas pomojn.


EL POPOLA ĈINIO 人民中国报道

**Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO**

**P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio**

**N-ro 11 (148) 1970**


# Ĉefa Enhavo


En Vasta Kamparo Estas Kulturataj Novaj Homoj

Nova Vojo de Biologia Fakultato de Ĝongŝan-universitato

La Agrikultura Mezlernejo Gujcun

Vivplenaj Sportistoj

Prezidanto Maŭ — Savanto de Kucongoj

La Geologia Taĉmento 909

Granda Venko de la Projekto por Jungi Huajhe

Pli ol Tridek Jarojn en Ĉinio

Revoluciaj Amikoj Vizitas Ginggang-montaron kaj Jan-an

Kanto de Amikeco

Maljuna Heroo Haŭ Ŝucaj

Riĉa Rikolto de Santajĝuang-brigado

Provo antaŭ Granda Inundo

Kia Varo Estas la "Plano de Rogers"?

Ni Decidis Persisti en la Batalo

# Ĝojigaj Novaĵoj pri la Agrikulturo de Nia Lando

Disvolvante la revolucian spiriton de sinapogo sur propraj fortoj kaj penema lukto en malfaciloj, la vastaj amasoj de malriĉkamparanoj kaj malsuperaj mezkamparanoj kaj revoluciaj kadroj de Hiangŝuj-gubernio, Giangsu-provinco turnis alkalan vastejon en bonajn kampojn kaj malaltproduktajn kampojn en altproduktajn kaj gajnis agrikulturan riĉrikolton en 4 sinsekvaj jaroj ekde la Granda Proletara Kultura Revolucio.







Hoŭfan-brigado de Jivu-gubernio, Ĝegiang-provinco gajnis stabilan kaj altan produkton de greno en 12 sinsekvaj jaroj kaj elkulturis nombron da "indiĝenaj specialistoj", "indiĝenaj teknikistoj" kaj "nudpiedaj plantoprotektantoj". Jen ĝiaj "indiĝenaj specialistoj" faras studon pri prevento de rizaj fiinsektoj.

*(Supre meze)* En la kuranta jaro Siĉuan-provinco gajnis kompare grandan pliproduktón sur ĉ. 40,000,000 muoj da agro kun tritiko kiel la ĉefa plantaĵo. Jen komunumanoj de Fandi-brigado de Pengŝan-gubernio kaj ĈPLA-anoj selektas tritikon.

Riza kombajno de alkroĉa tipo "Riĉrikolto-35" produktita de la Unua Fabriko de Agrikulturaj Maŝinoj de Hujjang-gubernio, Guangdong-provinco, en laboro








Bone kreskas kotonplantoj de Ĉenggiaŭ-komunumo de Hinje-gubernio, Henan-provinco. Jen ĝiaj komunumanoj faras flegadon kun zorgemo.

En Hjuĉang — la famkonata tabakprodukta regiono de nia lando, tabako ĝenerale kreskas bone kaj donas esperon de riĉa rikolto en la kuranta jaro.








Dongguan-gubernio de Guangdong-provinco, kiu famiĝis kiel produktejo de bananoj, ĉijare akiris grandan riĉrikolton de bananoj. Jen komunumanoj de Hingi-brigado enŝipigas bananojn por vendi ilin al la ŝtato.

Memmova grena kombajno "Ruĝa Flago" projektita kaj produktita de nia lando rikoltas tritikon sur altprodukta kampo de Janĝuang-brigado de Giĉeng-komunumo, Henan-provinco.





Plene utiligante la lokajn hidraŭlikajn fontojn de la montregiono, la popolo de Ĉangŝan-gubernio, Ĝegiang-provinco, konstruis multajn hidroelektrajn staciojn kaj tiel multe akcelis grandskalan pliprodukton de agrikulturo.



世界语《人民中国报道》一九八〇年第十一期（邮刊代号：二——九一五）